

ELEKTITAJ VERSOJ EL LA SANKTA KORANO

Eldonita de
Ahmadiyya-Movado en la Islamo
Nederlando
1988

Okaze de la ĝojiga fakto de la centjara jubileo de l'tutmonde disvastigita Ahmadiyya-Movado en La Islamo

Sanktigita kaj sincera donaco de Ahmadi Islamanoj konforma al la spirito de Hazrat Bilal, la martiroj kaj tiuj, kiuj estas severe punataj sur la vojo de sia Sinjoro pro la "krimo" de disvastigado de la "Kalima Tauhid" (la Kredkonfeso) kaj sia amo al ĝi.

ENHAVO

	paĝo
1. Allah-Dio	9
2. Anĝeloj	15
3. La Sankta Korano	19
4. Profetoj	25
5. La Sankta Profeto de la Islamo	33
6. Adorado	39
7. Fastado	43
8. La utiligo de riĉaĵo sur la vojo de Allah	47
9. Pilgrimo (Hadj) kaj Ka'ba (la Domo de Dio)	51
10. La transdono de la Sankta Mesaĝo al la tuta homaro	55
11. Etiketo, etiko, manieroj kaj kutimoj	59
12. Principoj de la ekonomia sistemo	65
13. Djihaad-kampanjo / ekstremaj klopodoj sur la vojo de Allah	69
14. La ecoj kaj la karaktero de kredantoj	73
15. Egalaj rajtoj por viroj kaj virinoj	77
16. Malpermeso de interezo kaj rentumo	81
17. Profetaĵoj	85
18. Observoj koncerne la naturon	91
19. Kelkaj preĝoj laŭ la instruoj en la Sankta Korano	97
20. Kelkaj mallongaj ĉapitroj de la Sankta Korano facile parkerigeblaj	101

ANTAŬPAROLO

Ĉiu verso de la Sankta Korano havas simplan kaj klaran signifon kaj eĉ komencanto, legante ĝin unufoje, povas iel imagi la subliman intencon de la verso. Lige kun tio ĉiu verso estas parto de unika unuigita sistemo de multoblaj kanaloj, enhavantaj multnombrajn, relative kaŝitajn signifojn. Voje de ĉi tiuj kanaloj la temo de ĉiu verso konsistigas ligan ĉeneron kun la antaŭa kaj la sekvanta versoj kaj la antaŭaj kaj sekvantaj ĉapitroj.

Sub tiu ĉi lumo du aferoj fariĝas klaraj:

- A) Kiel ajn preciza kaj adekvata iu klarigo estas, ĝi povas nur parte kontribui al la transdono de la signifo de libro, kiu estas tiel multflanka kaj signifiĉa kiel la Sankta Korano. Vere ne eblas aserti, ke iu ajn traduko povas transdoni al la leganto la kompletan mesaĝon formulitan en la origina teksto.
- B) Kiel ni jam eksplikis, estas tre malfacile, eĉ preskaŭ neeble, elekti rilate al iu temo kelkajn versojn el la Sankta Korano kiel ekzemplon kaj tiam opinii ĉi tiujn sufiĉe karakterizaj por detale prezenti la koncernan temon. Se ekzemple oni elektus nombron da versoj el la Sankta Libro por ekspliki la ekonomian sistemon kiel ĝi enkorpiĝas en la Sankta Korano, tiu tasko pro la supre menciitaj kialoj estus malhelpata; aldona kaŭzo estas, ke la filozofio sur kiu baziĝas la Islama ekonomia sistemo, troviĝas dise en granda parto de la Sankta Korano, kiu ne rekte rilatas al la temo ekonomio.

Konsiderante la fakton, ke por granda plimulto de la monda loĝantaro, kiu parolas malsamajn lingvojn kaj apartenas al diversaj kulturaj kaj etnaj grupoj, la aliro al la studado de ĉi tiu belega libro ankoraŭ estas barita, ni ekkomprenas la seriozecon de la situacio. Efektive estas tragedie, ke dum la pasintaj dek kvar jarcentoj la Sankta Korano estis tradukita en ne pli ol 65 lingvojn, dum la Biblio laŭ raporto de la Bibliaj asocioj jam estas tradukita en 1808 lingvojn.

Tial la tutmonde disvastigita Ahmadiyya Movado en la Islamo prenis sur sin la egeambician kaj noblan taskon eldoni kompletan tradukon de la Sankta Korano en minimume 50 multe parolataj lingvoj. Tio devos esti plenumita en 1989, la jaro en kiu la Ahmadiyya Movado en la Islamo festos sian centjaran jubileon.

Senkonsidere de tio oni entreprenas klopodon por almenaŭ parte prezenti la Sanktan Koranon al la parolantoj de multaj aliaj lingvoj, dum la preparado al kompleta traduko daŭros. Por konvene realigi tion oni faris laŭteman selekton el la versoj de la Sankta Korano cele al prezento de kelkaj fundamentaj Islamaj dogmoj al tiuj legantoj, kiuj havas malmultan aŭ neniun scion pri la Islamo.

Ni esperas kaj preĝas, ke tiu ĉi klopodo sukcesos iom kontentigi la sciemon kaj ke ĝi vekos novan sopiron lerni pli multe pri la perfekta gvidado trovebla en la Sankta Korano, la definitiva Dia revelacio.

La selekto de la versoj estas farita tiel, ke la jenaj gravaj temoj estas pritraktataj:

1. Allah-Dio
2. Anĝeloj
3. La Sankta Korano
4. Profetoj
5. La Sankta Profeto de la Islamo
6. Adorado
7. Fastado
8. La utiligo de riĉaĵo sur la vojo de Allah
9. Pilgrimo (Hadj) kaj Ka'ba (la Domo de Dio)
10. La transdono de la Sankta Mesaĝo al la tuta homaro
11. Etiketo, etiko, manieroj kaj kutimoj
12. Principoj de la ekonomia sistemo
13. Djihaad-kampanjo / ekstremaj klopodoj sur la vojo de Allah
14. La ecoj kaj la karaktero de kredantoj
15. Egalaj rajtoj por viroj kaj virinoj
16. Malpermeso de interezo kaj rentumo
17. Profetaĵoj
18. Observoj koncerne la naturon
19. Kelkaj preĝoj laŭ la instruo en la Sankta Korano
20. Kelkaj mallongaj ĉapitroj de la Sankta Korano facile parkerigeblaj.

Per la Graco de Allah la jenajn tradukojn de la Sankta Korano efektivigis la Ahmadiyya Movado en la Islamo:

angla, bengala, dana, Esperanta, germana, fanta, fiĝia, franca, gurmukha, haŭsa, hindia, indonezia, itala, joruba, kikujua, luganda, nederlanda, portugala, rusa, svahila, sveda kaj urdua.

Ĝojigas nin, ke ni ankaŭ povas informi ke tradukoj en pli ol 20 lingvoj estas pretaj por eldono. Kun la Graco de Allah ni baldaŭ povos prezenti ĉi tiujn tradukojn en presita formo. Temas pri la jenaj lingvoj:

albana, aria, asama, ĉina, gujrata, hispana, japana, kanra, korea, malaja, mandlia, maratha, norvega, pola, paŝtua, sinda, sveda, tamila, telugua, turka kaj vjetnama.

Ĉiujn demandojn pri la havebleco de la Sankta Korano en la diversaj lingvoj oni direktu al la eldonistoj aŭ al Ahmadiyya Islama Misio kie ajn en la mondo. La kompleta nederlanda traduko de la Sankta Korano kun la araba teksto kaj ampleksa antaŭparolo estas havebla ĉe la Mobarak-Moskeo en Den Haag.

Ni atentigas, ke la titoloj sub kiuj la teksto de la Sankta Korano estas prezentata, ne estas parto de la teksto mem. Tio ĉi estas klare indikata.

La elekton de la versoj prezentataj kiel ekzemplo en tiu ĉi publikaĵo faris Hazrat Mirza Tahir Ahmad, la estro de tutmonde disvastigita Ahmadiyya Movado en la Islamo.

M.A.Saqi,
Adjunkto Wakilut Tasnief &
Nazir Isha'at,
London.

1 - ALLAH-DIO

الله (Allah) estas la nomo de la Superega Estulo. En la araba lingvo oni neniam uzas la vorton Allah por alia afero aŭ alia estulo. La nomoj por Dio trovataj en aliaj lingvoj ĉiuj estas atributaj aŭ priskribaj kaj ofte estas uzataj plurale. La vorto "Allah" tamen neniam estas uzata plurale.

Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema. Estu laŭdegata Allah, Sinjoro de l'Universo, la Donema, la Pardonema, Majstro de la tago de la Lasta Juĝo. Nur Vin ni adoras kaj nur ĉe Vi ni serĉas helpon. Gvidu nin sur la rektan vojon. Sur la vojon de tiuj, al kiuj Vi donis Vian gracon, kiuj ne meritis Vian koleron, kiuj ne eraris. (1.1-7)

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
 الْحَمْدُ لِلَّهِ رَبِّ الْعَالَمِينَ
 الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
 مَلِكِ يَوْمِ الدِّينِ
 إِيَّاكَ نَعْبُدُ وَإِيَّاكَ نَسْتَعِينُ
 اهْدِنَا الصِّرَاطَ الْمُسْتَقِيمَ
 صِرَاطَ الَّذِينَ أَنْعَمْتَ عَلَيْهِمْ ۗ غَيْرِ الْمَغْضُوبِ
 عَلَيْهِمْ وَلَا الضَّالِّينَ

Gloregas Allahon, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Li estas la Ĉiopova, la Saĝa. Al Li apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero. Li igas vivi kaj morti, kaj Li havas povon super ĉiuj aferoj. Li estas la Unua kaj la Lasta, la Videbla kaj la Kaŝita, kaj Li scias ĉion. Estas Li Tiu, kiu kreis la ĉielojn kaj la teron en ses tagoj, poste Li sidiĝis sur la Tronon. Li scias, kio eniras en la teron kaj kio eliras el ĝi, kaj kio malsupreniras de la ĉielo kaj kio supreniras al ĝi. Li estas kun vi, kie ajn vi estas. Allah vidas ĉion, kion vi faras. Al Li apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero. Al Allah revenos ĉiuj

سَبَّحَ لِلَّهِ مَا فِي السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۗ وَهُوَ
 الْعَزِيزُ الْحَكِيمُ
 لَهُ مُلْكُ السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۗ يُحْيِي وَيُمِيتُ ۗ
 وَهُوَ عَلَىٰ كُلِّ شَيْءٍ قَدِيرٌ
 هُوَ الْأَوَّلُ وَالْآخِرُ وَالظَّاهِرُ وَالْبَاطِنُ ۗ وَهُوَ
 بِكُلِّ شَيْءٍ عَلِيمٌ
 هُوَ الَّذِي خَلَقَ السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضَ فِي سِتَّةِ
 أَيَّامٍ ثُمَّ اسْتَوَىٰ عَلَى الْعَرْشِ ۗ يَعْلَمُ مَا يَلْبِغُ
 فِي الْأَرْضِ وَمَا يَخْرُجُ مِنْهَا وَمَا يَنْزِلُ مِنَ
 السَّمَاءِ وَمَا يَرْجِعُ فِيهَا ۗ وَهُوَ مَعَكُمْ أَيْنَ
 مَا كُنْتُمْ ۗ وَاللَّهُ بِمَا تَعْمَلُونَ بَصِيرٌ
 لَهُ مُلْكُ السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۗ وَإِلَى اللَّهِ تُرْجَعُ
 الْأُمُورُ

aferoj. Li igas la nokton eniri en la tagon, kaj Li igas la tagon eniri en la nokton. Li konas ĉion, kio estas en la brustoj. Kredu je Allah kaj al Lia sendito kaj disdonu el tio, de kio Li faris vin heredantoj. Por tiuj el vi, kiuj kredas kaj almozdonas, estos granda rekompenco. (57.2-8)

يُولِجُ اللَّيْلَ فِي النَّهَارِ وَيُؤَلِّجُ النَّهَارَ فِي
الَّيْلِ وَهُوَ عَلِيمٌ بِذَاتِ الصُّدُورِ
أَمْنَا بِاللَّهِ وَرَسُولِهِ وَأَنْفِقُوا مِمَّا جَعَلَكُمْ
مُسْتَخْلِفِينَ فِيهِ فَالَّذِينَ أَمْنُوا مِنْكُمْ وَأَنْفَقُوا
لَهُمْ أَجْرٌ كَبِيرٌ

Glore gas Allahon ĉio, kio estas en la ĉieloj kaj kio estas sur la tero. Al Li apartenas la suvereneco kaj la laŭdego, kaj Li havas povon super ĉiuj aferoj. Estas Li Tiu, kiu kreis vin, sed inter vi estas miskredantoj kaj inter vi estas kredantoj, kaj Allah bone vidas, kion vi faras. Li kreis la ĉielojn kaj la teron per la vero, Li formis vin kaj faris vian formon bela, kaj al Li estos la hejmeniro. Li scias, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero, kaj Li scias, kion vi kaŝas kaj kion vi malkaŝas, kaj Allah scias, kio estas en la interno de la brustoj. (64.2-5)

يَسْبِغُ لَيْلَهُ مَا فِي السَّمَوَاتِ وَمَا فِي الْأَرْضِ لَهُ الْمُلْكُ
وَلَهُ الْحَمْدُ وَهُوَ عَلَى كُلِّ شَيْءٍ قَدِيرٌ
هُوَ الَّذِي خَلَقَكُمْ فَمِنْكُمْ كَافِرٌ وَمِنْكُمْ مُؤْمِنٌ
وَاللَّهُ بِمَا تَعْمَلُونَ بَصِيرٌ
خَلَقَ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضَ بِالْحَقِّ وَصَوَّرَكُمْ فَأَحْسَنَ
صُورَكُمْ وَإِلَيْهِ الْمَصِيرُ
يَعْلَمُ مَا فِي السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ وَيَعْلَمُ مَا تُسْمِنُونَ
وَمَا تُعْلِنُونَ وَاللَّهُ عَلِيمٌ بِذَاتِ الصُّدُورِ

Vere estas Allah Tiu, kiu ĝermigas la grajn kaj la daktilkernojn. Li estiĝas vivantojn el mortintoj kaj mortintojn el vivantoj. Tiu estas Allah! De kio vi do turnas vin for? Li estiĝas la tagiĝon; Li kreis la nokton por ripozi kaj la sunon kaj la lunon por mezuri la tempon. Tiu estas la dekreto de la Ĉiopova, la Ĉioscia. Estas Li Tiu, kiu kreis por vi la stelojn, por ke vi havu gvidilon en la mallumo sur la tero kaj sur la maro. Vere Ni detale klarigis la signojn por la popolo scianta. Estas Li Tiu, kiu estiĝis vin el unu

إِنَّ اللَّهَ فَالِقَ الْحَبِّ وَالنَّوَى يُخْرِجُ الْحَيَّ مِنَ الْمَيِّتِ وَمُخْرِجُ الْمَيِّتِ مِنَ الْحَيِّ ذَٰلِكُمُ اللَّهُ فَالِقُ
تُوفَّكَوْنَ
فَالِقِ الْإِصْبَاحِ وَجَعَلَ اللَّيْلَ سَكَنًا وَالشَّمْسَ وَالْقَمَرَ
حُسْبَانًا ذَٰلِكَ تَقْدِيرُ الْعَزِيزِ الْعَلِيمِ
وَهُوَ الَّذِي جَعَلَ لَكُمْ النُّجُومَ لِتَهْتَدُوا بِهَا فِي
ظُلُمَاتِ اللَّيْلِ وَالْبَحْرِ قَدْ فَصَّلْنَا الْآيَاتِ لِقَوْمٍ

persono kaj kaŭzis, ke ekzistu por vi hejmo kaj loĝejo. Vere Ni detale klarigis la signojn por la popolo komprenanta. Estas Li Tiu, kiu sendas akvon el la ĉielo. Ni estigas per ĝi ĉiuspecajn kreskaĵojn, kaj Ni estigas kun ili verdan foliaron, el kiu Ni estigas grenon. Kaj el la daktilpalmo - sub ĝiaj branĉoj - kreskas daktilspikoj. Kaj Ni estigas ĝardenojn de vinberarboj, kaj olivarbojn kaj granatarbojn - similajn kaj malsimilajn. Rigardu la fruktojn, kiel ili fruktas, kaj kiel ili maturiĝas. Vere en tio estas signoj por la popolo kredanta. Ili igas la Ĝinnojn rivaloj de Allah, kvankam Li kreis ilin; kaj ili atribuas al Li filojn kaj filinojn kontraŭ la vera scio. Li estas sankta kaj eminenta super tio, kion ili atribuas la Li! (6.96-101)

يَعْلَمُونَ ○
 وَهُوَ الَّذِي أَنْشَأَكُمْ مِنْ نَفْسٍ وَاحِدَةٍ فَمُسْتَقَرٌّ
 وَمُسْتَوْدَعٌ قَدْ فَضَّلْنَا الْآيَاتِ لِقَوْمٍ يَعْقِلُونَ ○
 وَهُوَ الَّذِي أَنْزَلَ مِنَ السَّمَاءِ مَاءً فَأَخْرَجْنَا بِهِ
 نَبَاتَ كُلِّ شَيْءٍ فَأَخْرَجْنَا مِنْهُ خَضِرًا نُخْرَجُ مِنْهُ
 حَبًّا مَاتَرَ كَبَابًا وَمِنَ النَّخْلِ مِنْ طَلْعِهَا قِنْوَانٌ دَانِيَةٌ
 وَجَنَّاتٍ مِنْ أَعْنَابٍ وَالزَّيْتُونَ وَالرُّمَّانَ مُسْتَبِيهَا
 وَغَيْرَ مُنْتَابِهٍ أَنْظُرُوا إِلَى ثَمَرِهِ إِذَا أَثَرَ وَيَنْعِهِ
 إِنَّ فِي ذَلِكَ لَآيَاتٍ لِقَوْمٍ يُؤْمِنُونَ ○
 وَجَعَلُوا لِلَّهِ شُرَكَاءَ الْجِنَّ وَخَلَقَهُمْ وَخَرَفُوا لَهُ
 بَيْنِينَ وَنَبَاتٍ بِغَيْرِ عِلْمٍ سُجِنَتْهُ وَتَعَالَى عَمَّا
 يَصِفُونَ ○

Allah! Ne ekzistas alia Dio ol Li, la Vivanta, la Sendependa kaj Ĉiosubtenanta; nek dormobezono nek dormo venkas Lin. Kio estas en la ĉielo kaj sur la tero, ĉio apartenas al Li. Kiu povas propeti ĉe Li sen Lia permeso? Li scias, kio estas antaŭ kaj malantaŭ la homoj, kaj ili nenion komprenas el Lia scio ol tion, kion Li volas. Lia regno enhavas la ĉielojn kaj la teron kaj la regado de ambaŭ ne lacigas Lin. Li estas la Eminentanta, la Grandega. (2.256)

اللَّهُ لَا إِلَهَ إِلَّا هُوَ الْعَلِيُّ الْقَيُّومُ لَا تَأْخُذُهُ سِنَّةٌ
 وَلَا نَوْمٌ لَهُ مَا فِي السَّمَوَاتِ وَمَا فِي الْأَرْضِ مَنْ
 ذَا الَّذِي يَشْفَعُ عِنْدَهُ إِلَّا بِإِذْنِهِ يَعْلَمُ مَا بَيْنَ
 أَيْدِيهِمْ وَمَا خَلْفَهُمْ وَلَا يُحِيطُونَ بِشَيْءٍ مِنْ
 عِلْمِهِ إِلَّا بِمَا شَاءَ وَسِعَ كُرْسِيُّهُ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضَ
 وَلَا يَئُودُهُ حِفْظُهُمَا وَهُوَ الْعَلِيُّ الْعَظِيمُ ○

Li estas Allah, Tiu, krom kiu ne ekzistas alia Dio, la Scianto de la Nevideblaĵoj kaj de la Videblaĵoj. Li estas la Donema, la Pardone-ma. Li estas Allah, Tiu, krom kiu ne ekzistas Dio, la Reĝo, la Sankta, la Sinjoro de la Paco, la Fidela, la Gardanta, la Cio pova, la Suverena, la Grandega. Sankta estas Allah, eminenta super ĉio, kion ili aldonas al Li kiel rivalojn! Li estas Allah, la Kreinto, la Forminto, la Estiginto. Al Li apartenas la plej belaj nomoj. Laŭdegas Lin ĉio, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Li estas la Ĉio pova, la Saĝa. (59.23-25)

هُوَ اللَّهُ الَّذِي لَا إِلَهَ إِلَّا هُوَ عِلْمُ الْغَيْبِ وَالشَّهَادَةِ
 هُوَ الرَّحْمَنُ الرَّحِيمُ
 هُوَ اللَّهُ الَّذِي لَا إِلَهَ إِلَّا هُوَ الْمَلِكُ الْقَدُّوسُ
 السَّلَامُ الْمُؤْمِنُ الْمُهِيمُنُ الْعَزِيزُ الْجَبَّارُ الْمُتَكَبِّرُ
 سُبْحَانَ اللَّهِ عَمَّا يُشْرِكُونَ
 هُوَ اللَّهُ الْخَالِقُ الْبَارِئُ الْمُصَوِّرُ لَهُ الْأَسْمَاءُ الْحُسْنَى
 يُسَبِّحُ لَهُ مَا فِي السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ وَهُوَ الْعَزِيزُ
 الْحَكِيمُ

2 - ANĜELOJ

La vorto **مَلَكٌ** (anĝelo) laŭlitere signifas "portanto de mesaĝo" aŭ "peranto". Tio klarigas la celon de la kreigo de anĝeloj. Ili transportas mesaĝojn de Dio kaj plenumas Lian volon en la universo. La anĝeloj do estas parto de la sistemo kiun Dio elektis por realigi Sian volon ne nur en la materia, sed ankaŭ en la spirita mondo.

En la spirita mondo la influo de la anĝeloj estas senpera kaj efika sen ia potenco intervenanta. Ne kredi je anĝeloj do signifus, ke oni baras la vojojn laŭ kiuj la lumo venas de Dio al la homo.

Estu laŭdegata Allah, la Kreinto de la ĉieloj kaj de la tero, kiu faras el la anĝeloj senditojn, dotitajn per flugiloj, po du, po tri, po kvar. Li aldonas al la kreo, kion Li volas. Vere Allah havas povon super ĉiuj aferoj. (35.2)

أَحْمَدُ لِلَّهِ فَاطِرِ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ جَاعِلِ الْمَلَائِكَةِ رُسُلًا أُولِي أَجْنِحَةٍ مَثْنَى وَثُلَاثَ وَرُبْعًا يَزِيدُ فِي الْخَلْقِ مَا يَشَاءُ إِنَّ اللَّهَ عَلَى كُلِّ شَيْءٍ قَدِيرٌ ○

Diru: "Kiu estas malamiko de Gabrielo" - vere li mem sendis tion en viajn korojn laŭ la permeso de Allah kiel plenumiĝon de tio, kio jam estis ĉe Li kaj kiel gvidilon kaj kiel bonan novaĵon por la justuloj - Kiu estas malamiko de Allah kaj de Liaj anĝeloj kaj de Gabrielo kaj de Miĥaelo, vere Allah mem estas malamiko de la miskredantoj. (2.98-99)

قُلْ مَنْ كَانَ عَدُوًّا لِجِبْرِيْلَ فَإِنَّهُ نَزَّلَهُ عَلَى قَلْبِكَ بِإِذْنِ اللَّهِ مُصَدِّقًا لِمَا بَيْنَ يَدَيْهِ وَهُدًى وَبُشْرًا لِلْمُؤْمِنِينَ ○
مَنْ كَانَ عَدُوًّا لِلَّهِ وَمَلَائِكَتِهِ وَرُسُلِهِ وَجِبْرِيْلَ وَمِيكَلَ فَإِنَّ اللَّهَ عَدُوٌّ لِلْكَافِرِينَ ○

Virto ne signifas turni vin orienten aŭ okcidenten, sed kredi je Allah kaj al la vivo venonta kaj je la anĝeloj kaj je la Libro kaj al la profetoj, kaj doni monon por la parencoj kaj por la orfoj kaj por la malriĉuloj kaj por la vojirantoj kaj por la almuzuloj kaj por la elaĉeto de la malliberuloj, kaj levi preĝon, kaj doni almuzojn, kaj respekti la aliancojn ĉiam, kiam ili estas faritaj; kaj havi firmecon en malriĉo kaj en malsano kaj en milittempo. Kiuj tiel agas, tiuj estas sinceremuloj kaj justuloj. (2.178)

لَيْسَ الْبِرَّ أَنْ تُوَلُّوا وُجُوهَكُمْ قِبَلَ الْمَشْرِقِ وَالْمَغْرِبِ وَلَكِنَّ الْبِرَّ مَنْ آمَنَ بِاللَّهِ وَالْيَوْمِ الْآخِرِ وَالْمَلَائِكَةِ وَالْكِتَابِ وَالنَّبِيِّينَ وَآتَى الْمَالَ عَلَى حُبِّهِ ذَوِي الْقُرْبَىٰ وَالْيَتَامَىٰ وَالسُّكَّانَ وَابْنَ السَّبِيلِ وَالسَّائِلِينَ وَفِي الرِّقَابِ وَأَقَامَ الصَّلَاةَ وَآتَى الزَّكَاةَ وَالْمُوفُونَ بِعَهْدِهِمْ إِذَا عَاهَدُوا وَالصَّابِرِينَ فِي الْبَأْسَاءِ وَالضَّرَّاءِ وَحِينَ الْبَأْسِ أُولَئِكَ الَّذِينَ صَدَقُوا وَأُولَئِكَ هُمُ الْمُتَّقُونَ ○

La sendito kredas je tio, kio estas sendita al li de lia Sinjoro kaj same la kredantoj. Ĉiu kredas je Allah kaj je Liaj anĝeloj kaj je Liaj Libroj kaj al Liaj senditoj. (2.286)

أَمَّنَ الرَّسُولُ بِمَا أُنزِلَ إِلَيْهِ مِنْ رَبِّهِ وَالْمُؤْمِنُونَ
كُلٌّ أَمَّنَ بِاللَّهِ وَمَلَائِكَتِهِ وَكُتُبِهِ وَرُسُلِهِ

Allah elektas senditojn el la anĝeloj kaj el la homoj. Vere Allah estas ĉioaŭda, ĉiovida. (22.76)

اللَّهُ يَصْطَفِي مِنَ الْمَلَائِكَةِ رُسُلًا وَمِنَ النَّاسِ
إِنَّ اللَّهَ سَمِيعٌ بَصِيرٌ

Ho vi, kredantoj! kreu je Allah kaj al Lia sendito kaj je la Libro, kiun Li sendis al Sia sendito, kaj je la Skribo, kiun Li sendis antaŭe. Kiu tamen ne kredas je Allah kaj je la anĝeloj kaj je Liaj Libroj kaj al Lia sendito kaj al la vivo venonta, tiu vere eraras per grandega eraro. (4.137)

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا آمِنُوا بِاللَّهِ وَرَسُولِهِ وَالْكِتَابِ الَّذِي
نَزَّلَ عَلَى رَسُولِهِ وَالْكِتَابِ الَّذِي أَنْزَلَ مِنْ قَبْلُ وَمَنْ
يَكْفُرْ بِاللَّهِ وَمَلَائِكَتِهِ وَكُتُبِهِ وَرُسُلِهِ وَالْيَوْمِ
الْآخِرِ فَقَدْ ضَلَّ ضَلَالًا بَعِيدًا

3 - LA SANKTA KORANO

القرآن (la Korano) estas la nomo kiun Dio mem donis al la libro revelaciita al la Sankta Profeto de la Islamo kaj enhavanta la definitivan leĝon por la homaro. La vorto "Korano" signifas libron celantan esti legata. La Korano efektive estas la plej legata libro en la mondo. La vorto signifas ankaŭ libron aŭ mesaĝon celantan esti transdonata al ĉiuj popoloj. La Korano estas la sola revelaciita libro kies transdono aŭ mesaĝo estas sen ia ajn limigo. Ĉar dum ĉiuj aliaj libroj estas destinitaj por difinitaj tempoj kaj difinitaj popoloj, la Korano estas destinita por ĉiuj tempoj kaj ĉiuj popoloj (34:29).

Alef Lâm Mim. * Ĉi tiu estas la Libro, en kiu ne estas dubo, gvidilo por la justuloj. (2.2-3)

الْم ۞
ذٰلِكَ الْكِتٰبُ لَا رَيْبَ فِيْهِ هُدًى لِّلْمُتَّقِيْنَ ۝

Ĉi tiu vere estas nobla Korano en Libro bone gardata. (56.78-79)

اِنَّهٗ لَقُرْاٰنٌ كَرِيْمٌ ۝
فِيْ كِتٰبٍ مَّكْنُوْنٍ ۝

En kiuj estas skribitaj eternaj dekretoj. (98.4)

فِيْهَا كُتِبَ قِيَمَةٌ ۝

Allah sendis la plej belan senditaĵon, Libron en akordo kun aliaj, ofte legata, antaŭ kiu frostiĝas la haŭto de tiuj, kiuj respektegas sian Sinjoron, poste moliĝas ilia haŭto kaj iliaj koroj, memorante Allahon. Tiu ĉi estas la gvidilo de Allah: Li gvidas per ĝi, kiun Li volas. Por tiu, kiun Allah lasas erari, ne ekzistas gvidanto. (39.24)

اللّٰهُ نَزَلَ اَحْسَنَ الْوَحْيِ كِتٰبًا مُّشٰهَدًا مَّا تَنٰزَلَتْ
تَقْشَعِرُّ مِنْهُ جُلُوْدُ الَّذِيْنَ يَخْشَوْنَ رَبَّهُمْ تُرَّيْلٰنِ
جُلُوْدُهُمْ وَقُلُوْبُهُمْ اِلٰى ذِكْرِ اللّٰهِ ذٰلِكَ هُدًى
اللّٰهُ يَهْدِيْ بِهٖ مَنْ يَّشَآءُ وَمَنْ يُضَلِلِ اللّٰهُ
فَمَا لَهُ مِنْ هَادٍ ۝

Hâ Mim. ** Per la klara Libro! Vere Ni faris ĝin Skribo ofte legata en lingvo araba, por ke vi komprenu. Vere ĝi estas, en la originalo de la Libro, kiu estas ĉe Ni, eminenta, plena de saĝeco. (43.2-5)

حَمْ ۞
وَ الْكِتٰبِ الْبَيِّنِ ۝
اِنَّا جَعَلْنٰهُ قُرْاٰنًا عَرَبِيًّا لَعَلَّكُمْ تَعْقِلُوْنَ ۝
وَ اِنَّهٗ فِىْ اُوْر الْاِكْتٰبِ لَدَيِّنَا لَعَلٌ حٰكِيْمٌ ۝

* Entute 28 ĉapitroj de la Korano komenciĝas per similaj mallongigoj. Laŭ iuj tradicioj ĉiu litero prezentas specialan atributon aŭ sencon intime ligitan kun la enhavo de la koncerna ĉapitro. Ĉi tie la klarigo kutime akceptata de la tri literoj Alef (A), Lâm (L) kaj Mim (M) estas: Mi, Allah, Ĉioscia.

** Laŭdegenda, Ĉioscia!

Ni vere donis la leĝon al la ĉieloj kaj al la tero kaj al la montoj, sed ili rifuzis porti ĝin, ĉar ili timis ĝin, sed la homo akceptis ĝin.* Vere li estas maljusta kaj nescia. La sekvo estas, ke Allah punos la hipokritulojn kaj la hipokritulinojn kaj la idolanojn kaj la idolaninojn, kaj Allah turnos Sin kompateme al la kredantoj kaj al la kredantinoj, kaj Allah estas senkulpigema, pardonema. (33.73-74)

إِنَّا عَرَضْنَا الْأَمَانَةَ عَلَى السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ وَالْجِبَالِ فَأَبَيْنَ أَنْ يَحْمِلْنَهَا وَأَشْفَقْنَ مِنْهَا وَحَمَلَهَا الْإِنْسَانُ إِنَّهُ كَانَ ظَلُومًا جَهُولًا
يَعْتَدِبَ اللَّهُ الْمُتَّقِينَ وَالْمُؤْمِنَاتِ وَالْمُشْرِكِينَ وَالشُّرُكِيَّةَ وَيُتُوبَ اللَّهُ عَلَى الْمُؤْمِنِينَ وَالْمُؤْمِنَاتِ وَكَانَ اللَّهُ غَفُورًا رَحِيمًا

Diru: "Eĉ se unuiĝus la homoj kaj la Ĝinnoj por estigi ion similan al ĉi tiu Korano, ili ne povus estigi ion similan al ĝi, eĉ se ili subtenus unu la alian". Ni vere prezentis al la homoj en ĉi tiu Korano ĉiuspecajn similaĵojn, sed la plej multaj el la homoj rifuzis ĉion krom la miskredon. (17.89-90)

قُلْ لَئِنِ اجْتَمَعَتِ الْإِنْسُ وَالْجِنُّ عَلَىٰ أَنْ يَأْتُوا بِسُورَةِ هَذَا الْقُرْآنِ لَا يَأْتُونَ بِسُورَةٍ وَلَا يَكُونُ لَهُمْ جِزَاءٌ بِمَا كَفَرُوا
وَلَقَدْ صَرَّفْنَا لِلنَّاسِ فِي هَذَا الْقُرْآنِ مِنْ كُلِّ مَثَلٍ فَأَلَّىٰ أَكْثَرُ النَّاسِ إِلَّا لِقَوْمًا

Ĉu povas esti trompisto tiu, kiu posedas evidentan pruvon de sia Sinjoro kaj kiun sekvas atestanto de Li kaj kiun antaŭiris la Skribo de Moseo kiel gvidilo kaj graco? Ili kredos al li kaj por tiuj el la partio malamika, kiuj rifuzos, estos sola restadejo la fajro. Do ne estu dubanta pri tio. Tio certe estas la vero de via Sinjoro, sed la plej multaj el la homoj ne kredas. (11.18)

أَفَنَنْكَرُ بَعْدَ مَا جَاءَنَا بِبَيِّنَاتٍ مِنْ رَبِّهِ وَيُنَبِّئُهَا شَاهِدٌ مِنْهُ وَمَنْ قَبْلَهُ كَتَبَ مُوسَىٰ إِمَامًا وَرَحْمَةً أُولَٰئِكَ يُؤْمِنُونَ بِهِ وَمَنْ يَكْفُرْ بِهِ مِنَ الْأَحْزَابِ فَالنَّارُ مَوْعِدُهُ فَلَا تَكُ فِي مِرْيَةٍ مِنْهُ إِنَّهُ الْحَقُّ مِنْ رَبِّكَ وَلَكِنَّ أَكْثَرُ النَّاسِ لَا يُؤْمِنُونَ

* Temas pri la morala leĝo, kiun oni povas obei aŭ malobei.

Tiu ĉi estas Libro, kiun Ni revelaciis, benplena, plenumiĝo de tio, kio estis antaŭe kaj helpilo por admoni la Patrinojn de la urboj* kaj de ĉiuj ĉirkaŭe. (6.93)

وَهَذَا كِتَابٌ أَنْزَلْنَاهُ مَبْرُكٌ مُصَدِّقٌ لِّذِي بَيْنِ
يَدَيْهِ وَلِتُنذِرَ أُمَّ الْقُرَىٰ وَمَنْ حَوْلَهَا

Hodiaŭ Mi perfektigis por vi vian religion, kaj Mi plenumis Mian gracon por vi, kaj Mi elektis por vi la Islamon kiel religion. (5.4)

الْيَوْمَ اكْمَلْتُ لَكُمْ دِينَكُمْ وَأَتَمَمْتُ عَلَيْكُمْ نِعْمَتِي وَ
رَضِيتُ لَكُمُ الْإِسْلَامَ دِينًا

Tiu ĉi estas la Libro, kiun Ni sendis, plena de benoj, do sekvu ĝin kaj estu singarde-
maj por ke estu kompato por vi. (6.156)

وَهَذَا كِتَابٌ أَنْزَلْنَاهُ مَبْرُكٌ فَاتَّبِعُوهُ وَاتَّقُوا لَعَلَّكُمْ
تُرْحَمُونَ

El la Korano Ni sendas iom post iom tion, kio estas sanigilo kaj favoro por la kredantoj; por la malbonfarantoj tamen ĝi nur pliligas la malutilon. (17.83)

وَنُزِّلَ مِنَ الْقُرْآنِ مَا هُوَ شِفَاءٌ وَرَحْمَةٌ
لِّلْمُؤْمِنِينَ وَلَا يَزِيدُ الظَّالِمِينَ إِلَّا خَسَارًا

* Mekko

4 - PROFETOJ

La Sankta Korano certigas, ke Allah sendis al ĉiu popolo guidanton kaj certigas do la verecon kaj honestecon de ĉiu profeto. En diversaj tempoj de la historio profetoj estis sendataj al iuj popoloj por konduki ilin al Allah. La Sankta Profeto estis la lasta leĝportanta profeto kaj la mesaĝo de la Islamo enhavas kaj anstataŭas do ĉiujn antaŭajn skribaĵojn. La profeteco daŭras, sed nur ene de la Islamo. Ankoraŭ nun aperas profetoj por respeguli la lumon de la Sankta Profeto, sed ili ne alportas novan leĝon.

La Sankta Korano priskribis ne nur la pozitivan aspekton de la profeteco, sed ankaŭ la naturon de la rezisto kiun spertis ĉiu profeto. La farao estas la Korana simbolo de la fortoj kiuj rezistas ĉiun profeton.

Allah elektas senditojn el la anĝeloj kaj el la homoj. Vere Allah estas ĉioaŭda, ĉiovida. (22.76)

اللَّهُ يَصْطَلِي مِنَ الْمَلَائِكَةِ رُسُلًا وَمِنَ النَّاسِ
إِنَّ اللَّهَ سَمِيعٌ بَصِيرٌ ۝

Ni vere vekis ĉe ĉiu popolo senditon: "Adoru Allahon kaj evitu malbonon". Inter ili estis iuj, kiujn Allah gvidis, kaj estis inter ili iuj, kontraŭ kiuj estis decidite, ke ili restos en la erarado. Do vojaĝu sur la tero kaj rigardu, kiel estis la fino de la negintoj! (16.37)

وَلَقَدْ بَعَثْنَا فِي كُلِّ أُمَّةٍ رَسُولًا لِيَنِ اعْبُدُوا اللَّهَ
وَاجْتَنِبُوا الطَّاغُوتَ فَمِنْهُمْ مَنْ هَدَى اللَّهُ
وَمِنْهُمْ مَنْ حَقَّتْ عَلَيْهِ الضَّلَالَةُ فَايْتَرُوا فِي الْأَرْضِ
فَانظُرُوا كَيْفَ كَانَ عَاقِبَةُ الْمُكذِبِينَ ۝

Kiam via Sinjoro diris al la anĝeloj: "Mi certe metos sur la teron anstataŭanton", ili diris: "Ĉu vi fakte volas meti sur ĝin iun, kiu estigas malpacon kaj verŝas sangon? Ni male laŭdegas Vin kaj gloras Vian sanktecon". Li tamen diris: "Vere Mi scias, kion vi ne scias". (2.31)

وَإِذْ قَالَ رَبُّكَ لِلْمَلَائِكَةِ إِنِّي جَاعِلٌ فِي الْأَرْضِ خَلِيفَةً
قَالُوا أَتَجْعَلُ فِيهَا مَنْ يُفْسِدُ فِيهَا وَيَسْفِكُ الدِّمَاءَ
وَنَحْنُ نُسَبِّحُ بِحَمْدِكَ وَنُقَدِّسُ لَكَ قَالَ إِنِّي أَعْلَمُ
مَا لَا تَعْلَمُونَ ۝

Vere Ni sendis revelacion al vi, kiel Ni antaŭe sendis al Noa kaj al la profetoj post li; kaj Ni sendis revelacion al Abraham kaj Ismael kaj Isaak kaj Jakob kaj al la gentoj kaj al Jesuo kaj Ijob kaj Jona kaj Aaron kaj Salomono, kaj Ni donis al David la psalmojn. Estas iuj senditoj, pri kiuj Ni antaŭe ĉion klarigis al vi, kaj aliaj senditoj, pri kiuj Ni ne klarigis ion ajn al vi - tamen Allah parolis al Moseo malkaŝe. (4.164-165)

إِنَّا أَوْحَيْنَا إِلَيْكَ كَمَا أَوْحَيْنَا إِلَى نُوحٍ وَالتَّيْمِينَ
مِنْ بَعْدِهِ وَ أَوْحَيْنَا إِلَى إِبْرَاهِيمَ وَإِسْمَاعِيلَ وَ
إِسْحَاقَ وَيَعْقُوبَ وَ الْأَسْبَاطِ وَعِيسَى وَأَيُّوبَ
وَيُوسُفَ وَهُرُونَ وَ سُلَيْمَانَ وَ آتَيْنَا دَاوُدَ
سُرُورًا ۝
وَرُسُلًا قَدْ قَصَصْنَاهُمْ عَلَيْكَ مِنْ قَبْلُ وَرُسُلًا
لَمْ نَقْصُصْهُمْ عَلَيْكَ وَ كَلَّمَ اللَّهُ مُوسَى تَكْوِيمًا ۝

Memoru, kiam elprovis Abrahamon Lia Sinjoro per Siaj vortoj kaj li eltenis tiun elprovon. Li diris: "Mi faros vin gvidanto de la gentoj" kaj Abraham demandis: "Kio estos pri mia idaro?". Li respondis: "Mia alianco ne koncernas la pekemulojn". (2.125)

وَأَوْبَتْنِي إِلَىٰ رَبِّهِمْ رَبُّهُ بِكَلِمَتٍ فَأَتَتْهُنَّ قَالَ إِنِّي جَاعِلُكَ لِلنَّاسِ إِمَامًا قَالَ وَمِنْ ذُرِّيَّتِي قَالَ لَا يَنَالُ عَهْدِي الظَّالِمِينَ ۝

Ni vere donis al Moseo la Libron kaj poste Ni igis senditojn sekvi lin kaj Ni donis al Jesuo, la filo de Maria, signojn evidentajn, kaj Ni fortigis lin per la spirito de sankteco. Ĉu vi volas esti ribelemaj, ĉiufoje kiam venas al vi senditoj? Ĉu vi volas rifuzi iujn el ili kaj mortigi aliajn? (2.88)

وَلَقَدْ آتَيْنَا مُوسَى الْكِتَابَ وَقَفَّيْنَا مِنْ بَعْدِهِ بِالرُّسُلِ وَآتَيْنَا عِيسَى ابْنَ مَرْيَمَ الْبَيْتَ وَآيَاتِنَاهُ بُرُوحَ الْقُدُسِ أَفَكُلَّمَا جَاءَكُمْ رَسُولٌ بِمَا لَا تَهْوَىٰ أَنفُسُكُمْ اسْتَكْبَرْتُمْ فَفَرِحْنَا بِكُم بَوْمًا وَغَرِبْنَا تَنْتَلُونَ ۝

Ni kondukis la idojn de Izrael trans la maron, kaj Faraono kaj liaj armeoj persekutis ilin maljuste kaj malamike, ĝis alproksimiĝis la drono kaj li diris: "Mi kredas, ke ne ekzistas alia Dio ol Tiu, je kiu kredas la idoj de Izrael, kaj mi estas unu el la submetiĝintoj". Kiel? Nun? Vere vi estis ĝis nun malobeema kaj vi estis unu el la malpacemuloj. Ni tamen volas savi hodiaŭ vian korpon, por ke vi mem estu signo por la posteuloj. Certe la plej multaj el la homoj ignoras Niajn signojn. (10.91-93)

وَجُوزْنَا بِبَنِي إِسْرَائِيلَ الْبَحْرَ فَأَتَبَعَهُمْ فِرْعَوْنُ وَجُنُودَهُ بَغْيًا وَعَدُوًّا كَافِرًا إِذَا أَدْرَاكَ الْعُرْقُ قَالَ أَمَنْتُ أَنَّهُ لَا إِلَهَ إِلَّا الَّذِي آمَنْتُ بِهِ بَنُو إِسْرَائِيلَ وَأَنَا مِنَ الْمُسْلِمِينَ ۝

النَّاسِ وَقَدْ عَصَيْتَ قَبْلَ وَكُنْتَ مِنَ الْمُفْسِدِينَ ۝

فَالْيَوْمَ نُنَجِّيكَ بِبَدَنِكَ لِتَكُونَ لِمَنْ خَلَقَكَ آيَةً وَإِنَّ كَثِيرًا مِنَ النَّاسِ عَنْ آيَاتِنَا لَغَفُلُونَ ۝

Rakontu tion, kio estas en la Libro pri Maria; kiam ŝi foriĝis for de sia gento al iu loko, orienten. Kaj kasis sin de ili per vualo, kaj Ni sendis al ŝi Nian spiriton, kaj li aperis al ŝi en formo de homo perfekta. Ŝi diris: "Mi serĉas rifuĝon kontraŭ vi ĉe mia Sinjoro; malproksimiĝu, se vi estas justulo". Li respondis: "Mi vere estas nur sendito de via Sinjoro, por doni al vi puran filon". Ŝi diris: "Kiel do estiĝos por mi filo, kvankam neniu viro tuŝis min, kaj mi neniam estis malĉasta?". Li respondis: "Tiel estas; sed via Sinjoro diras: Tio estas facila por Mi kaj tio estas, por ke li estu signo por la homoj kaj kiel kompatato de Ni, kaj tio estas afero decidita". Ŝi gravediĝis kaj foriĝis kun li al malproksima loko. Kaj la doloroj de la nasko puŝis ŝin al la trunko de palmo. Ŝi diris: "Ho se mi estus mortinta, antaŭe, kaj mi nun vere estus forgesitaĵo!". Tiam estis vokite al ŝi de sube: "Ne ĉagreniĝu, vere via Sinjoro fluigis rivereton sub vi. Nur skuu do la trunkon de la palmo, ĝi faligos sur vin maturajn daktilojn. Manĝu kaj trinku, kaj refreŝigu vian okulon*, kaj se vi vidas iun homon, tiam diru: "Mi vere promesis al la Donema faston, tial mi ne parolos hodiaŭ al iu ajn estajo".

وَ اذْ كُرْنَا فِي الْكَلْبِ مَرِيْمًا اِذَا نَتَبَدَّتْ مِنْ اَهْلِهَا
مَكَانًا شَرِقِيًّا ۝

فَاَخَذَتْ مِنْ دُونِهِمْ حِجَابًا ۗ فَارْسَلْنَا اِلَيْهَا
رُوحَنَا فَتَمَثَّلَ لَهَا بَشَرًا سَوِيًّا ۝

قَالَتْ اِنِّي اَعُوذُ بِالرَّحْمٰنِ مِنْكَ اِنْ كُنْتَ تَقِيًّا ۝

قَالَ اِنَّمَا اَنَا رَسُوْلٌ رَّبِّكَ ۗ لَآ اَهْبَ لِكَ عُلْمًا
زَكِيًّا ۝

قَالَتْ اَنۢى يَكُوْنُ لِي عُلْمٌ وَّلَمْ يَنْسِنِي بَشْرًا وَّ
لَمۡ اَكۡ بَعِيًّا ۝

قَالَ كَذٰلِكَ قَالَ رَبُّكَ هُوَ عَلٰى هٰٓئةٍ وَّلَيۡنَجْعَلُهٗ اٰيَةً
لِّلنَّاسِ وَرَحْمَةً وَّ مَنًّا ۗ وَكَانَ اَمْرًا مَّقْضِيًّا ۝

نَحَمَلْتُهُ فَاَنۢتَبَدَّتْ بِهٖ مَكَانًا قَبِيًّا ۝
فَاَجَاءَهَا الْمَخَاضُ اِلَى جِدْعِ النَّخْلَةِ ۗ قَالَتْ

بَلِيَّتِيۙ وَتُ تَبَلِّ هٰذَا وَكُنْتُ نَسِيًّا مَّنۡسِيًّا ۝
فَنَادٰ بِهَا مِنْ تَحْتِهَا اَلَا تَحَرَّنِيۙ قَدْ جَعَلَ رَبُّكَ

تَحْتِكَ سَرِيًّا ۝

وَهُرِّيۙ اِلَيْكَ بِجِدْعِ النَّخْلَةِ ۗ تَسْقِطُ عَلٰىكَ رَطْبًا
جَبِيًّا ۝

فَكُلِّيۙ وَاشْرَبِيۙ وَقَرِّيۙ عَيْنًا ۗ فَاِمَّا تَرَيْنَ مِنَ الْبَشَرِ
اٰحَدًا فَفُوقِيۙ اِنِّي نَذَرْتُ لِلرَّحْمٰنِ صَوْمًا فَلَنْ اَكُلِمَ

*

Konsolu vin

Poste ŝi venis al sia popolo, portante lin. Ili diris: "Ho Maria, vi certe faris ion strangan. Ho fratino de Aaron, via patro ne estis malbonulo, nek estis via patrino malĉastulino!". Kaj ŝi montris lin. Ili diris: "Kiel ni povas paroli al li, kiu estas infano en la lulilo?". Li parolis: "Vere mi estas servanto de Allah. Li donis al mi la Libron kaj faris min profeto; Kaj Li igis min benata, kie ajn mi estas, kaj Li ordonis al mi la preĝon kaj la almozdodon dum mia tuta vivo; Kaj Li faris min respektema al mia patrino, kaj Li ne faris min malhumila aŭ ribelema. La paco estis kun mi en la tago, en kiu mi naskiĝis, kaj estos en la tago, en kiu mi mortos, kaj en la tago, en kiu mi denove vekigos al la vivo". Tiel estas Jesuo, filo de Maria - parolo de la vero, pri kiu ili malkonsentis. (19.17-35)

الْيَوْمَ اِنِّيَا ۝
 فَاتَتْ بِهِ قَوْمَهَا تَحِيْلَهُۥ قَالُوْا يَمْرُؤٌمَ لَقَدْ جِئْتِ
 شَيْئًا قَرِيْنًا ۝
 يَاۤاَحْتِ هُرُوْنَ مَا كَانَ اَبُوْكَ اَمْرًا سَوِيًّا وَمَا كَانَتْ
 اُمُّكَ بَعِيْنًا ۝
 فَاشَارَتْ اِلَيْهِۗو قَالُوْا كَيْفَ نُنْكَلُ مِنْۢ مَّكَانٍ فِي
 الْهَدِيْ صَبِيْنًا ۝
 قَالَ اِنِّي عَبْدُ اللّٰهِ اَنْشَا لِي الْكِتٰبَ وَجَعَلَنِي نَبِيًّا ۝
 وَجَعَلَنِي مُبْرَكًا اَبْنًا مَا كُنْتُ وَاَوْصِيَنِي بِالصَّلٰوةِ
 وَالزَّكٰوةِ مَا دُمْتُ حَيًّا ۝
 وَبَرًّاۢ بِوَالِدِيۡنِ وَلَمْ يَجْعَلْنِيۡ جَبًا اَشَقِيًّا ۝
 وَالتَّلَامُ عَلٰى يَوْمٍ وُلِدْتُ وَيَوْمَ اَمُوْتُ وَيَوْمٍ
 اُبْعَثُ حَيًّا ۝
 ذٰلِكَ عِيْسٰى ابْنُ مَرْيَمَ قَوْلَ الْحَقِّ الَّذِي فِيْهِ
 يَنْتَرُوْنَ ۝

Memoru kiam Allah faris kun ili la aliancon de la profetoj: "Kion ajn Mi donos al vi el la Libro kaj el la saĝo, poste venos al vi sendito, kiel plenumiĝo de tio, kio estas ĉe vi; do vi kredu al li kaj helpu lin". Li diris: "Ĉu vi konsentas kaj akceptas tion sub tiu kondiĉo?" Kaj ili respondis: "Ni konsentas". Kaj tiam Li diris: "Do atestu ĝin, kaj Mi estos kun vi kiel atestanto". (3.82)

وَرٰدٌ اَخَذَ اللّٰهُ مِيْثَاقَ النَّبِيِّۦنَ لَمَّا اَتَيْنٰكُمْ مِنْۢ مَّ
 كِنٰبٍ وَحِكْمَةٍ ثُمَّ جَاءَكُمْ رَسُوْلٌ مُّصَدِّقٌ لِّمَا
 مَعَكُمْ لَتَتَّوْبُنَّۤ اِلَيْهِۗو وَلَتَنْتَضِرُنَّۤ قَالَاۤءَ اَقْرَبْتُمْ
 وَاَخَذْتُمْ عَلٰى ذٰلِكُمْ اِصْرِيۡنِۗ قَالُوْا اَقْرَبْنَاۗ قَالَ
 فَاَشْهَدُوْا وَاَنَا مَعَكُمْ مِنَ الشّٰهِدِيۦنَ ۝

Memoru, kiam Ni faris aliancon kun la profetoj kaj kun vi kaj kun Noa kaj kun Abraham kaj kun Moseo kaj kun Jesuo la filo de Maria. Ni faris kun ili solenan aliancon. (33.8)

وَاِذَا اخَذْنَا مِنَ التَّيِّبِينَ مِيثَاقَهُمْ وَمِنْكَ وَمِنْ
 نُوحٍ وَّ اِبْرٰهِيْمَ وَّ مُوسٰى وَّ عِيسٰى ابْنِ مَرْيَمَ
 وَاَخَذْنَا مِنْهُم مِّيثَاقًا عَلِيًّا ۝

5 - LA SANKTA PROFETO DE LA ISLAMO

La Profeto naskiĝis en Mekko en aŭgusto 570 p.K. Li ricevis la nomon Mahometo. Tiu ĉi nomo signifas "la laŭdato". Kiam la Profeto transpasis la aĝon de tridek jaroj, la amo de Dio komencis pli kaj pli regi lin. Li ekribelis kontraŭ la politeismo kaj la malvirteco de la popolo de Mekko kaj preferis regule mediti en groto situanta 3 ĝis 4 kilometrojn ekster Mekko. Atinginte la aĝon de kvardek jaroj li tie ricevis sian unuan revelacion. Tiu revelacio, kiu formuliĝis en la unuaj revelaciitaj versoj de la Sankta Korano (96:2-6), entenis la ordonon proklami la nomon de la Ununura Dio, kiu kreis la homon kaj semis en lian naturon la semon de Sia amo kaj de la amo por la proksimulo; ĝi entenis krome la antaŭdiron, ke al la mondo ĉia kono estos instruata per la plumo. Ĉi tiuj versoj formas koncizan enhavon de la Korano.

Ho vi Profeto! Ni vere sendis vin kiel ates-
tanton kaj kiel portanton de la bona novaĵo
kaj kiel admonanton. Kaj kiel vokanton al
Allah per Lia ordono kaj kiel brilegantan
lampon. Anoncu do al la kredantoj la bo-
nan novaĵon: ke vere por ili estos granda
graco de Allah. (33.46-48)

يَا أَيُّهَا النَّبِيُّ إِنَّا أَرْسَلْنَاكَ شَاهِدًا وَمُبَشِّرًا وَ
نَذِيرًا ۝
وَدَاعِيًا إِلَى اللَّهِ بِآذَانِهِ وَسِرَاجًا مُنِيرًا ۝
وَبَشِيرِ الْمُؤْمِنِينَ بَأَنَّ لَهُمْ مِنْ اللَّهِ فَضْلًا كَبِيرًا ۝

Diru: "Ho homoj! Vere mi estas sendita al
vi ĉiuj de Allah, al kiu apartenas la suvere-
neco de la ĉieloj kaj de la tero. Aŭskultu!
Ne ekzistas alia Dio ol Li. Li donas la vivon
kaj la morton. Kredu do je Allah kaj al Lia
sendito, la profeto, kiu ne scipovas legi nek
skribi, kiu kredas je Allah kaj al Lia vorto,
kaj sekvu lin, por ke vi estu gvidataj".
(7.159)

قُلْ يَا أَيُّهَا النَّاسُ إِنِّي رَسُولُ اللَّهِ إِلَيْكُمْ جَمِيعًا الَّذِي
لَهُ مُلْكُ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ ۖ لَا إِلَهَ إِلَّا هُوَ يُحْيِي وَ
يُمِيتُ فَأَمِنُوا بِاللَّهِ وَرَسُولِهِ الْآخِي الَّذِي
يُؤْمِنُ بِاللَّهِ وَكَلِمَاتِهِ وَاتَّبِعُوهُ لَعَلَّكُمْ تَهْتَدُونَ ۝

Ni sendis vin nur kiel portanton de la bona
novaĵo kaj kiel admonanton por la tuta ho-
maro, sed la plej multaj el la homoj ne scias
tion. (34.29)

وَمَا أَرْسَلْنَاكَ إِلَّا كَافَّةً لِّلنَّاسِ بَشِيرًا وَنَذِيرًا وَ
لَكِنَّ أَكْثَرَ النَّاسِ لَا يَعْلَمُونَ ۝

Kaj por vi certe estos senfina rekompenco.
Kaj vi certe posedas eminenta noblan ani-
mion. (68.4-5)

وَأَنَّ لَكَ لَأَجْرًا غَيْرَ مَمْنُونٍ ۝
وَأَنَّكَ لَظَلَمٌ ظُلْمًا عَظِيمًا ۝

Mahometo ne estas la patro de iu ajn el viaj viroj,* sed la sendito de Allah kaj la sigelo de la profetoj; kaj Allah vere scias ĉion. (33.41)

مَا كَانَ مُحَمَّدٌ أَبَا أَحَدٍ مِّن رِّجَالِكُمْ وَلَكِن رَّسُولَ اللَّهِ وَخَاتَمَ النَّبِيِّينَ وَكَانَ اللَّهُ بِكُلِّ شَيْءٍ عَلِيمًا ۝

Vere en la sendito vi havas belegan ekzemplon por ĉiu, kiu esperas je Allah kaj je la lasta tago kaj ofte memoras Allahon. (33.22)

لَقَدْ كَانَ لَكُمْ فِي رَسُولِ اللَّهِ أُسْوَةٌ حَسَنَةٌ لِّمَن كَانَ يَرْجُوا اللَّهَ وَالْيَوْمَ الْآخِرَ وَذَكَرَ اللَّهَ كَثِيرًا ۝

Allah sendas Sian benon sur la Profeton, kaj Liaj anĝeloj preĝas por li. Ho vi, kredantoj! Preĝu ankaŭ vi por li kaj deziru al li pacon, humile. (33.57)

إِنَّ اللَّهَ وَمَلَائِكَتَهُ يُصَلُّونَ عَلَى النَّبِيِّ يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا صَلُّوا عَلَيْهِ وَسَلِّمُوا تَسْلِيمًا ۝

Mahometo estas sendito de Allah. Tiuj, kiuj estas kun li, estas severaj kontraŭ la miskredantoj, sed afablaj inter si. Vi vidas ilin riverenci, terenkuŝiĝi, strebante al la graco de Allah kaj al Lia plezuro. Iliaj distingiloj estas sur iliaj vizaĝoj: la signoj de la terenkuŝiĝo. Jen ilia similaĵo en la Torao kaj ilia similaĵo en la Evangelio: "Ili estas kiel la semgrajno, kiu estigas sian ĝermon, poste plifortigas ĝin, poste ĝi dikiĝas kaj firme staras sur sia trunketo, ĝojigante la semistojn". Ĝi kolerigos la miskredantojn. Allah promesis al tiuj el ili, kiuj kredas kaj bonfaras, pardonon kaj grandegan rekompencan. (48.30)

مُحَمَّدٌ رَسُولُ اللَّهِ وَالَّذِينَ مَعَهُ أَشِدَّاءُ عَلَى الْكُفَّارِ وَهَمَّاءٌ بَيْنَهُمْ تَرَاهُمْ رُكَّعًا سُجَّدًا يَبْتَغُونَ فَضْلًا مِّنَ اللَّهِ وَرِضْوَانًا سِيمَاهُمْ فِي وُجُوهِهِمْ مِّنْ أَسْوَارٍ السُّجُودِ ذَلِكَ مَثَلُهُمْ فِي التَّوْرَةِ وَمِثْلَهُمْ فِي الْإِنْجِيلِ تَفْصِيلًا أُخْرِجَ شَطْرَهُ فَأَرْزُقَهُمْ فَنَسْتَظِلُّهُ فَاسْتَوَىٰ عَلَىٰ سُوْقِهِ يُعْجِبُ الزُّرَّاعَ لِيَغِيظَ بِهِمُ الْكُفَّارَ وَعَدَّ اللَّهُ الَّذِينَ آمَنُوا وَعَمِلُوا الصَّالِحَاتِ مِنْهُمْ مَغْفِرَةً وَأَجْرًا عَظِيمًا ۝

* Neniu el la viraj idoj de la Profeto fakte atingis maturan aĝon

Diru: "Se vi amas Allahon, vi sekvu min; tiam Allah amos vin kaj pardonos al vi viajn pekojn. Allah estas senkulpigema, pardonema". Diru: "Obeu Allahon kaj la senditon". Se ili tamen turnas sin for, sciuj, ke Allah ne amas la miskredantojn. (3.32-33)

قُلْ إِنْ كُنْتُمْ تُحِبُّونَ اللَّهَ فَاتَّبِعُونِي يُحْبِبْكُمُ اللَّهُ وَيَغْفِرْ لَكُمْ ذُنُوبَكُمْ وَاللَّهُ غَفُورٌ رَحِيمٌ
 قُلْ أَطِيعُوا اللَّهَ وَالرَّسُولَ فَإِنْ تَوَلَّوْا فَإِنَّ اللَّهَ لَا يُحِبُّ
 الْكَافِرِينَ

Ho vi, sendito! Anoncu tion, kio estis sendita al vi de via Sinjoro; se vi ne faras tion, vi ne anoncas Liajn senditaĵojn. Allah protektos vin de la homoj. Vere Allah ne gvidas la popolon miskredantan. (5.68)

يَأْتِيهَا الرَّسُولُ بَلِّغْ مَا أُنزِلَ إِلَيْكَ مِنْ رَبِّكَ وَإِنْ لَمْ تَفْعَلْ مَا بَلَّغْتَ رِسَالَتَهُ وَاللَّهُ يَعْصِمُكَ مِنَ النَّاسِ
 إِنَّ اللَّهَ لَا يَهْدِي الْقَوْمَ الْكَافِرِينَ

6 - ADORADO

Post la kredo je la unueco de Dio la preĝo estas la dua el la kvin kolonoj de la Islamo. Preĝi estas la plej forta rimedo por estigi kaj firmigi ligojn kun la Kreinto kaj por proksimiĝi al Li. Ĝi estas dinamisma fenomeno; Dio aŭdas kaj elaŭdas preĝojn. La Islama koncepto de preĝo estas, ke ĝi naskiĝas senpere kaj spontanee el la animo de la peteganto kaj estas antaŭmetata al la dia majesto kun la certeco pri la graco, kofavoro kaj potenco de Allah. Adorante oni ne bezonas peranton inter la homo kaj lia Kreinto.

Sed al ili estis ordonite nur, ke ili adoru Allahon en perfekta obeemo al Li kaj en sincera kredo, kaj ke ili levu la preĝon kaj almozdonu. Tiu ĉi estas la ĉiama kredo. (98.6)

وَمَا أُمِرُوا إِلَّا لِيَعْبُدُوا اللَّهَ مُخْلِصِينَ لَهُ
الَّذِينَ لَهُ حُنُفَاءٌ وَيُقِيمُوا الصَّلَاةَ وَيُؤْتُوا الزَّكَاةَ
وَذَلِكَ دِينُ الْقَيِّمَةِ ۝

Ni kreis la Ĝinnoj kaj la homojn, nur por ke ili adoru Min. (51.57)

وَمَا خَلَقْتُ الْجِنَّ وَالْإِنْسَ إِلَّا لِيَعْبُدُونِ ۝

Levu la preĝon, kiam la suno subiras ĝis la mallumo de la nokto, kaj legu la Koranon je la tagiĝo. Vere la legado de la Korano je la tagiĝo estas plej konvena. Vekiĝu por tio en la nokto: jen io pli utila por vi. Verŝajne via Sinjoro plialtigis vin al eminenta rango. (17.79-80)

اقْرَأِ الصَّلَاةَ لِدُلُوكِ الشَّمْسِ إِلَى غَسَقِ اللَّيْلِ وَ
قُرْآنَ الْفَجْرِ إِنَّ قُرْآنَ الْفَجْرِ كَانَ مَشْهُودًا ۝
وَمِنَ اللَّيْلِ فَتَهَجَّدْ بِهِ نَافِلَةً لَكَ لَعَلَّكَ تَبْتَغِيكَ
رَبُّكَ مَقَامًا مَحْمُودًا ۝

Observu la preĝojn kaj la preĝon mezan kaj staru humile antaŭ Allah. (2.239)

حُفِظُوا عَلَى الصَّلَوَاتِ وَالصَّلَاةِ الْوُسْطَىٰ وَقُومُوا
لِلَّهِ قَانِتِينَ ۝

7 - FASTADO

La Sankta Korano preskribas la fastadon inter la tagiĝo kaj la sunsubiro dum la lunmonato Ramadan. Ĝi estas disciplino kiu akcelas sincerecon kaj kiu por serĉanto plifaciligas la supreniradon al spirita alteco. Fastanto konsciigas pri ĉiuj diaj favoroj kaj la fastado do helpas lin uzi tiujn favorojn bonfare.

Ho vi kredantoj! Al vi estas ordonite fasti, kiel estis ordonite al tiuj, kiuj estis antaŭ vi, por ke vi evitu la malbonon. Tio validas por fiksita nombro da tagoj; sed kiu el vi estas malsana aŭ en vojaĝo, tiu fastu poste por la sama nombro da tagoj; kaj por tiuj, kiuj ne kapablas fari tion krom per grava ofero, estos eble alie plenumi sian devon, nome nutri malriĉulon. Kaj por tiu, kiu faros bonon, pli ol estas devo, des pli bone estos por li; kaj fasti estas bone por vi, se nur vi komprenas tion. (2.184-185)

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا كُتِبَ عَلَيْكُمُ الصِّيَامُ كَمَا كُتِبَ
عَلَى الَّذِينَ مِن قَبْلِكُمْ لَعَلَّكُمْ تَتَّقُونَ ۝
أَيَّامًا مَّعْدُودَاتٍ فَمَن كَانَ مِنكُم مَّرِيضًا أَوْ عَلَى
سَفَرٍ فَعِدَّةٌ مِّنْ أَيَّامٍ أُخَرَ وَعَلَى الَّذِينَ يُطِيقُونَهُ
فِدْيَةٌ طَعَامُ مِسْكِينٍ فَمَن تَطَوَّعَ خَيْرًا فَهُوَ خَيْرٌ
لَّهُ وَأَن تَصُومُوا خَيْرٌ لَّكُمْ إِن كُنتُمْ تَعْلَمُونَ ۝

8 - LA UTILIGO DE RIĈAĴO SUR LA VOJO DE ALLAH

La imposto je kapitalo, preskribita en la Sankta Korano, envortigas sian celon en sia propra nomo "Zakaat". Tiu vorto signifas "tio, kio purigas kaj kuraĝigas". Oni subtrahas la komunuman porcion de la tuta riĉaĵo kaj tiel purigas la reston por tiuj, kiuj estas rajtigitaj uzi ĝin; oni utiligas la rentumon por servo al la komunumo kaj tiel progresigas la bonfarton de la komunumo. Zakaat estas la tria kolono de la Islamo kaj do respegulas la gravecon, kiun la Islamo aljuĝas al la respondeco rilate la proksimulojn.

Kaj levu la preĝon kaj donu almozojn kaj genufleksu kun la genufleksantoj. (2.44) وَاقِيمُوا الصَّلَاةَ وَآتُوا الزَّكَاةَ وَارْكَعُوا مَعَ الرَّاكِعِينَ

Donu do al la parenco tion, kio apartenas al li, kaj ankaŭ al la malriĉuloj kaj al la vojiranto. Tio estas plej bona por tiuj, kiuj deziregas vidi la vizaĝon de Allah. Tiuj estos sukcesaj. (30.39) فَاتِ ذَا الْقُرْبَىٰ حَقَّهُ وَالْيَتَامَىٰ وَالسَّبِيلَ
ذَلِكَ خَيْرٌ لِّلَّذِينَ يُرِيدُونَ وَجْهَ اللَّهِ وَأُولَٰئِكَ هُمُ الْمُفْلِحُونَ

El iliaj proprajoj ĉiam estis parto destinita por la almozuloj kaj por la malhelpitoj. (51.20) وَفِي أَمْوَالِهِمْ حَقٌّ لِّلسَّائِلِ وَالْمَحْرُومِ

Kaj tiuj, en kies proprajoj estas parto destinita por la almozulo kaj por la malriĉulo hontema. (70.25-26) وَالَّذِينَ فِي أَمْوَالِهِمْ حَقٌّ مِّنْ أَمْوَالِهِمْ
لِلسَّائِلِ وَالْمَحْرُومِ

La almozoj estas nur por la malriĉuloj kaj por la mizeruloj, por la oficistoj okupitaj per sia administrado kaj por tiuj, kies koroj devas esti konkeritaj, kaj por la liberigo de sklavoj, kaj por la ŝuldantoj, kaj por la afero de Allah, kaj por la vojirantoj: tio estas dekreto de Allah. Allah estas ĉioscia, saĝa. (9.60) إِنَّمَا الصَّدَقَتُ لِلْفُقَرَاءِ وَالْمَسْكِينِ وَالْعَمِلِينَ
عَلَيْهَا وَالْمَوْلَاةِ قُلُوبُهُمْ وَفِي الرِّقَابِ وَالْغُرَبَىٰ
وَفِي سَبِيلِ اللَّهِ وَابْنِ السَّبِيلِ فَرِيضَةٌ مِّنْ اللَّهِ
وَاللَّهُ عَلِيمٌ حَكِيمٌ

Ho vi kredantoj! Donu tion, kion Ni donis al vi, antaŭ ol venos la tago, en kiu ne estos eble komerci kaj ne plu validos amikeco nek propeto; la miskredantoj estas malbonfarantoj. (2.255)

يَأْتِيهَا الَّذِينَ آمَنُوا أَنْفِقُوا مِمَّا رَزَقْنَاكُمْ مِنْ قَبْلِ
أَنْ يَأْتِيَكُمْ يَوْمٌ لَا يَبِيعُ فِيهِ وَلَا خَلَّةٌ وَلَا شَفَاعَةٌ
وَ الْكٰفِرُونَ هُمُ الظَّالِمُونَ ○

Tiuj, kiuj donas el siaj proprajoj por la afero de Allah, similas al grajno kiu estigas sep spikojn kaj en ĉiu el ili estas po cent grajnoj. Allah plimultigas, kion Li volas. Allah estas indulgema, ĉioscia. Tiuj, kiuj donas el siaj proprajoj por la afero de Allah kaj ne levas poste riproĉojn kaj ofendojn, ricevos la rekompencan de sia Sinjoro kaj por ili plu ne estos timo nek malgajeco. (2.262-263)

مَثَلُ الَّذِينَ يُنْفِقُونَ أَمْوَالَهُمْ فِي سَبِيلِ اللَّهِ كَمَثَلِ
حَبَّةٍ أُنْبَتَتْ سَبْعَ سَنَابِلٍ فِي كُلِّ سَنَابِلَةٍ مِائَةٌ
حَبَّةٌ وَاللَّهُ يُضَوِّفُ لِمَنْ يَشَاءُ وَاللَّهُ وَاسِعٌ عَلِيمٌ ○
الَّذِينَ يُنْفِقُونَ أَمْوَالَهُمْ فِي سَبِيلِ اللَّهِ تَحَرُّوا
يُتَّبِعُونَ مَا أَنْفَقُوا مَنًّا وَلَا أَذَىٰ لَهُمْ أَجْرُهُمْ
عِنْدَ رَبِّهِمْ وَلَا خَوْفٌ عَلَيْهِمْ وَلَا هُمْ يَحْزَنُونَ ○

Tiuj, kiuj disdonas el siaj havaĵoj, deziregante plaĉi al Allah kaj plifortigante siajn animojn, similas al ĝardeno sur alta grundo: pluvego falanta sur ĝin estigas duoblan rikolton; se tamen ne falas pluvego, tiam venas la roso. Allah vidas, kion vi faras. (2.266)

وَمَثَلُ الَّذِينَ يُنْفِقُونَ أَمْوَالَهُمْ ابْتِغَاءَ مَرْضَاتِ
اللَّهِ وَتَثْبِيْتًا مِنْ أَنْفُسِهِمْ كَمَثَلِ حَبَّةٍ يَرْتَجُو
أَصَابَهَا وَأَبْءٌ فَأَنْتَ أَكْثَرُ ضَعْفَيْنِ فَإِنْ لَمْ يُصِبْهَا
وَأَبْءٌ فَظَلُّوا وَاللَّهُ بِمَا تَعْمَلُونَ بَصِيرٌ ○

Tiuj, kiuj disdonas el siaj proprajoj nokte aŭ tage, kaŝe aŭ malkaŝe, trovos sian rekompencan ĉe sia Sinjoro kaj por ili ne plu estos timo nek malgajeco. (2.275)

الَّذِينَ يُنْفِقُونَ أَمْوَالَهُمْ بِاللَّيْلِ وَالنَّهَارِ سِرًّا
وَعَلَانِيَةً فَلَهُمْ أَجْرُهُمْ عِنْدَ رَبِّهِمْ وَلَا خَوْفٌ عَلَيْهِمْ
وَلَا هُمْ يَحْزَنُونَ ○

Rigardu! Vi estas tiuj, kiuj estis vokitaj por almozdoni por la afero de Allah, sed inter vi estas iuj, kiuj estas avaraj; tiu tamen, kiu estas avara, agas kontraŭ si mem, ĉar Allah estas la Memsufiĉa kaj vi estas dependaj. Se vi turnos vin for, Li estigos anstataŭ vi alian popolon, kaj ili ne estos similaj al vi. (47.39)

هَآأَنْتُمْ هَؤَلَاءِ تُدْعُونَ لِنُفُوقُوا فِي سَبِيلِ اللَّهِ
فِيْسَآءُ مَنْ يَبْخُلُ وَمَنْ يَبْخُلْ فَإِنَّا نَبْخُلُ عَنْ
نَفْسِهِ وَاللَّهُ الْغَنِيُّ وَأَنْتُمُ الْفُقَرَاءُ وَإِن تَوَلَّوْا
يَسْتَبْدِلْ قَوْمًا غَيْرَكُمْ ثُمَّ لَا يَكُونُوا أَمْثَالِكُمْ ۝

9 - PILGRIMO (HADJ) KAJ KA'BA (LA DOMO DE DIO)

La Korano devigas ĉiujn Islamanojn unufoje en sia vivo pilgrimi al Mekko, se ili povas trovi eblon por tio kaj se la vojaĝo estas sedanĝera. La centro de la pilgrimo estas la Ka'ba, kiu laŭ la Korano estas la unua domo konstruita por la adorado de Dio. La celo de la Pilgrimo estas krei internacian fratecon en la koroj de la Islamanoj kaj per plenumado de iuj ritaj agoj gravuri en la korojn de la Islamanoj, ke Dio estas la ĉefa celo en ilia vivo.

Al tiuj, kiuj nekredas kaj devojigas de la afero de Allah kaj de la Sankta Moskeo-kiun Ni igis sanktejo por ĉiuj homoj, egale, ĉu ili estas loĝantaj tie aŭ ĉu ili estas nomadoj - kaj al tiuj, kiuj provas profani ĝin per malpiegeco, Ni gustumigos doloran punon. Memoru, kiam Ni asignis al Abraham la lokon de la Domo: "Ne aldonu al Mi ion ajn kiel rivalon, kaj purigu Mian Domon por tiuj, kiuj ĉirkaŭiras ĝin kaj kiuj staras kaj kiuj falas teren surgenuiĝante. Kaj anoncu al la homoj la pilgrimon; ili venos al vi piedirante aŭ rajdante ĉiun ajn malgrasan kamelon, sur ĉiuj malproksimaj vojoj, por atesti ĝian utilon por si mem; kaj memoru la nomon de Allah en la fiksitaj tagoj, dankante pro tiu brutaro, kiun Li donis al ili kiel nutraĵon. Manĝu do el ĝi kaj nutru la malriĉulojn, la mizerulojn. Poste ili plenumu siajn puriĝon kaj siajn jurojn kaj ili ĉirkaŭiru la antikvan Domon." (22.26-30)

إِنَّ الَّذِينَ كَفَرُوا وَيَصَدُّونَ عَن سَبِيلِ اللَّهِ
وَالْمَسْجِدِ الْحَرَامِ الَّذِي جَعَلْنَاهُ لِلنَّاسِ سَوَاءً
يُلْعَلُكَ فِيهِ وَالْبَادِ وَمَن يَرِدْ فِيهِ بِإِلْحَادٍ
بِظُلْمٍ تَذَاتَهُ مِنْ عَذَابِ إِلِيمٍ
وَلَا بَوَاتًا لِإِبْرَاهِيمَ مَكَانَ الْبَيْتِ أَن لَّا تُشْرَكَ
بِي شَيْئًا وَطَهِّرْ بَيْتِيَ لِلطَّائِفِينَ وَالْقَائِمِينَ
وَالرُّكَّعِ السُّجُودِ
وَأَزِّنْ فِي النَّاسِ بِالْحَقِّ يَا تَوَكُّلَ رَبِّجَالِدٍ وَعَلَى
كُلِّ صَامِرٍ ثَابِتِينَ مِنْ كُلِّ فِجِّ عَيْبَتِي
لِيَتَشَهُدُوا مَنَافِعَ لَهُمْ وَيَذْكُرُوا اسْمَ اللَّهِ فِي
آيَاتٍ مَّعْلُومَاتٍ عَلَى مَا رَزَقَهُمْ مِنْ بَيْهَاتِهِ الْأَنْعَامِ
فَكُلُوا مِنْهَا وَأَطْعِمُوا الْبَائِسَ الْفَقِيرَ
ثُمَّ لِيَقْضُوا تَفَثَهُمْ وَلِيُوفُوا نُدُورَهُمْ وَلِيَطَّوَّفُوا
بِالْبَيْتِ الْعَتِيقِ

En ĝi estas signoj evidentaj, ĝi estis la restadejo de Abraham. Kiu ĝin eniras, tiu havas pacon. Por tiu, kiu iel ajn povos trovi la vojon por iri pilgrime al ĝi, tio estas devo antaŭ Allah. Kiu rifuzos, tiu sciu, ke Allah vere estas sendependa de ĉiuj kreitaĵoj. (3.98)

فِيهِ آيَاتٌ بَيِّنَاتٌ مَّقَامُ إِبْرَاهِيمَ وَمَنْ دَخَلَهُ كَانَ
آمِنًا وَلِيْلَهُ عَلَى النَّاسِ حُجُّ الْبَيْتِ مَنِ اسْتَطَاعَ
إِلَيْهِ سَبِيلًا وَمَنْ كَفَرَ فَإِنَّ اللَّهَ غَنِيٌّ عَنِ الْعَالَمِينَ

La monatoj por la pilgrimo estas konataj; do kiu decidis plenumi tiam la pilgrimon, ne ekposedu virinon kaj ne peku kaj ne estigu malpacon dum la pilgrimo. Allah scias, kion ajn bonan vi faras. Pretigu provizaĵojn, sed la plej bona provizaĵo estu la justeco. Respektegu nur Allahon, ho vi prudentuloj! (2.198)

الْحَجُّ أَشْهُرٌ مَّعْلُومَاتٌ فَمَنْ فَرَضَ فِيهِنَّ الْحَجَّ
فَلَا رَفَثَ وَلَا فُسُوقًا وَلَا جِدَالَ فِي الْحَجِّ وَمَا
فَعَلُوا مِنْ خَيْرٍ يَعْلَمُهُ اللَّهُ تَزَوَّدُوا فَإِنَّ خَيْرَ
الزَّادِ التَّقْوَىٰ وَاتَّقُونِ يَا أُولِي الْأَلْبَابِ ○

10 - LA TRANSDONO DE LA SANKTA MESAĜO AL LA TUTA HOMARO

Transdonante la mesaĝon de Allah oni devas konsideri ĉiun faktoron kiu povas influi la sintenon de la koncernato. Oni devas memori, ke la celo estas ke la koncernato aprezu la Dian alvokon kaj respondu al ĝi. Tiun ĉi principon bone ilustras la instrukcioj donitaj al Moseo kaj Aaron pri la maniero en kiu ili devis aliri kaj admoni la Faraonon.

Kiu estas pli ĝusta je la parolo ol tiu, kiu vokas Allahon kaj bonfaras kaj diras: "Mi vere estas submetiĝinto"? Bono kaj malbono ne estas egalaj. Vi do forigu la malbonon per tio, kio estas plej bona. Jen, tiu, kontraŭ kiu vi havis malamikecon, fariĝos la plej sincera amiko. Tio tamen estas konsentita nur al la persistemuloj, kaj tio estas konsentita nur al posedanto de noblega animo. (41.34-36)

وَمَنْ أَحْسَنُ قَوْلًا قِمْتَنَ دَعَا إِلَى اللَّهِ وَعَمِلَ
صَالِحًا وَقَالَ إِنَّنِي مِنَ الْمُسْلِمِينَ ○
وَلَا تَسْتَوِي الْحَسَنَةُ وَلَا السَّيِّئَةُ ادْفَعْ بِالَّتِي
هِيَ أَحْسَنُ فَإِذَا الَّذِي بَيْنَكَ وَبَيْنَهُ عَدَاوَةٌ
كَأَنَّهُ وَدِّي حِمِيمٌ ○
وَمَا يُلْقِيهَا إِلَّا الَّذِينَ صَبَرُوا وَمَا يُلْقِيهَا
إِلَّا ذُو حِظٍّ عَظِيمٍ ○

Voku al la afero de via Sinjoro kun saĝeco kaj bona admono, kaj rezonu bonege kun ili. Vere Allah bone scias, kiu devojigis de Lia afero, kaj Li bone konas la gvidatojn. Se vi punos, faru tion nur laŭ la kvanto de la ofendo ricevita; se vi tamen volas esti paciencaj, tiam tio estas plej bona por la pacienuloj. Persistu - via pacienco tamen venas nur de Allah - kaj ne afliktiĝu pri ili kaj ne maltrankviliĝu pro iliaj maĥinacioj. Vere Allah estas kun la justuloj kaj kun la bonfarantoj. (16.126-129)

ادْعُ إِلَى سَبِيلِ رَبِّكَ بِالْحُكْمَةِ وَالنُّوعِظَةِ الْحَسَنَةِ
وَجَادِلْهُمْ بِالَّتِي هِيَ أَحْسَنُ إِنَّ رَبَّكَ هُوَ أَعْلَمُ
بِمَنْ صَلَّ عَنْ سَبِيلِهِ وَهُوَ أَعْلَمُ بِالْمُهْتَدِينَ ○
وَإِنْ عَاقَبْتُمْ فَعَاقِبُوا بِمِثْلِ مَا عُوِبْتُمْ بِهِ
وَإِنَّ صَبْرَكُمْ لَهُو خَيْرٌ لِلصَّابِرِينَ ○
وَاصْبِرْ وَمَا صَبْرُكَ إِلَّا بِاللَّهِ وَلَا تَحْزَنْ عَلَيْهِمْ
وَلَا تَكُ فِي ضَيْقٍ مِمَّا يَمْكُرُونَ ○
إِنَّ اللَّهَ مَعَ الَّذِينَ اتَّقَوْا وَالَّذِينَ هُمْ
مُحْسِنُونَ ○

Se unu el la idolanoj petas de vi protekton, ricevu lin, ĝis li kapablos ekkompreni la vorton de Allah, poste lasu lin atingi sian celon de sekureco. Tio estas, ĉar ili estas popolo nescianta. (9.6)

وَإِنْ أَحَدٌ مِنَ الشَّرِكَينَ اسْتَجَارَكَ فَأَجْرُهُ حَتَّى يَمِيعَ
كَلِمَ اللَّهِ ثُمَّ ابْلِغْهُ مَا أَمَنَهُ ذَلِكَ بِأَنَّهُمْ قَوْمٌ لَا
يَعْلَمُونَ ○

Por tiuj tamen, kiuj rifuzas adori la idolojn kaj turnas sin al Allah, estas la bona novaĵo. Donu do la bonan novaĵon al Miaj servantoj, kiuj aŭskultas la vortojn kaj sekvas la plej bonan el ili. Estas ili tiuj, al kiuj Allah montris la vojon kaj kiuj estas prudentaj. (39.18-19)

وَالَّذِينَ اجْتَنَبُوا الطَّاغُوتَ أَنْ يَعْبُدُوهَا وَأَنَابُوا
إِلَى اللَّهِ لَهُمُ الْبُشْرَىٰ فَبَشِّرْ عِبَادِ
الَّذِينَ يَسْتَمِعُونَ الْقَوْلَ فَيَتَّبِعُونَ أَحْسَنَهُ أُولَٰئِكَ
الَّذِينَ هَدَىٰ اللَّهُ وَأُولَٰئِكَ هُمُ الْأُولِيَاءُ ○

11 - ETIKETO, ETIKO, MANIEROJ KAJ KUTIMOJ

La Korano instruas la akcepton de la vivo, ne ĝian malakcepton aŭ neglekton. La monaĥeja vivo kaj asketismo ne estas permesataj en la Islamo. Vivi honeste kaj utiligi dece kaj ekvilibre la kapablojn kaj favorojn donitajn de Dio, estas la regulo de la vivo. Kadre de tiu ĉi ĝenerala filozofio la Korano donas detalajn indikojn por progresigi moralajn kaj spiritajn valorojn. La celo estas la utila kaj kunordigita evoluo de ĉiuj kapabloj.

Vere la kredantoj estas fratoj, do pacigu viajn fratojn kaj respektigu Allahon, por ke estu kompato por vi. Ho vi kredantoj! Ne ridu iuj el vi pri la aliaj - eble ĉi tiuj estas pli bonaj ol tiuj - nek virinoj pri aliaj virinoj - eble ĉi tiuj estas pli bonaj ol tiuj. Ne kalumniu kaj ne insultu unu la alian. Malbona estas la akuzo de malvirto post la kredo! Kiuj ne pentas, tiuj estas la malpieguloj. Ho vi kredantoj, evitu la oftan suspekton, ĉar kelkaj suspektoj estas peko, kaj ne spionu kaj ne kalumniu unu la alian. Ĉu al iu el vi plaĉus manĝi la karnon de sia frato mortinta? Vi certe abomenus tion. Respektigu do Allahon. Vere Allah estas grandanima, pardonema. (49.11-13)

إِنَّمَا الْمُؤْمِنُونَ إِخْوَةٌ فَأَصْلِحُوا بَيْنَ أَخَوَيْكُمْ
وَاتَّقُوا اللَّهَ لَعَلَّكُمْ تُرْحَمُونَ ۝
يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا لَا يَسْخَرُ قَوْمٌ مِنْ قَوْمٍ عَسَى
أَنْ يَكُونُوا خَيْرًا مِنْهُمْ وَلَا نِسَاءٌ مِنْ نِسَاءٍ عَسَى
أَنْ يَكُنَّ خَيْرًا مِنْهُنَّ وَلَا تَلْمِزُوا أَنْفُسَكُمْ وَلَا
تَنَابَزُوا بِاللِّقَابِ بئْسَ الإِسْمُ الفُسُوقُ بَعْدَ
الإِيمَانِ وَمَنْ لَمْ يَتُبْ فَأُولَئِكَ هُمُ الظَّالِمُونَ ۝
يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا اجْتَنِبُوا كَثِيرًا مِمَّا قَلِقَتْ
بَعْضُ الظَّرِئَةِ ثُمَّ دَلَّاتُ جَسَدًا وَلَا يَغْتَبِ
بَعْضُكُم بَعْضًا أَيُحِبُّ أَحَدُكُمْ أَنْ يَأْكُلَ لَحْمَ
أَخِيهِ مِمَّا فَكَرَهُهُ سَوْءٌ وَاتَّقُوا اللَّهَ إِنَّ اللَّهَ
قَوَّابٌ رَجِيمٌ ۝

Adoru Allahon kaj ne aldonu al Li rivalojn, kaj faru bonon al viaj gepatroj kaj parencoj kaj al la orfoj kaj al la malriĉuloj kaj al la najbaro, kiu estas parenco, kaj al la najbaro, kiu estas fremdulo, al la kunulo je via flanko kaj al la vojiranto kaj al tiuj, kiujn posedas via mano dekstra. Vere Allah ne amas la fieregajn nek la fanfaronemajn, kiuj estas avaraj kaj instigas la homojn al la avareco kaj kaŝas, kion Allah donis al ili per Sia graco. Ni pretigis por la miskredantoj hontigan punon, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj donas almozojn nur, por ke la homoj vidu

وَأَعْبُدُوا اللَّهَ وَلَا تُشْرِكُوا بِهِ شَيْئًا وَبِالْوَالِدَيْنِ
إِحْسَانًا وَبِذِي الْقُرْبَىٰ وَالْيَتَامَىٰ وَالسَّبْيِ وَالْجَارِ
ذِي الْقُرْبَىٰ وَالْجَارِ الْجُنُبِ وَالصَّاحِبِ بِالْجَنبِ
وَابْنِ السَّبِيلِ وَمَا مَلَكَتْ أَيْمَانُكُمْ إِنَّ اللَّهَ لَأَجِبٌ
مَنْ كَانَ مُخْتَلًا فُجُورًا ۝
الَّذِينَ يَبْخُلُونَ وَيَأْمُرُونَ النَّاسَ بِالْبُخْلِ وَيَكْتُمُونَ
مَا آتَاهُمُ اللَّهُ مِنْ فَضْلِهِ وَأَعْتَدْنَا لِلْكَافِرِينَ عَذَابًا
مُهِينًا ۝

ilin, sed ne kredas je Allah kaj al la vivo venonta, kaj por tiuj, kies kunulo estas Sata-no. Vere malbonega kunulo! (4.37-39)

وَالَّذِينَ يُتَّقُونَ أَمْوَالَهُمْ رِئَاءَ النَّاسِ وَلَا يُؤْمِنُونَ
بِاللَّهِ وَلَا بِالْيَوْمِ الْآخِرِ وَمَنْ يَكُنِ الشَّيْطَانُ لَهُ قَرِينًا
فَسَاءَ قَرِينًا ۝

Vere Allah ordonas justecon kaj bonfara-don kaj helpadon al la parencoj, kaj Li mal-permesas la diboĉon, la malbonon kaj la perforton. Li admonas vin, por ke vi memo-ru tion. Plenumu la aliancon kun Allah, kiam vi faris aliancon, kaj ne rompu la ju-rojn, post kiam vi faris ilin; vi ja elektis Alla-hon via garantianto. Vere Allah scias, kion vi faras. Ne estu kiel virino, kiu rompas sian fadenon en disligitajn erojn, post kiam ŝi ŝpinis ĝin. Vi faras viajn jurojn iloj de trom-po reciproka, pro timo ke unu partio povos iĝi pli forta ol la alia. Allah nur elprovas vin per tio, kaj Li klarigos por vi, en la tago de la reviviĝo tion, pri kio vi malkonsentis. (16.91-93)

إِنَّ اللَّهَ يَأْمُرُ بِالْعَدْلِ وَالْإِحْسَانِ وَإِيتَاءِ ذِي
الْقُرْبَىٰ وَيَنْهَىٰ عَنِ الْفَحْشَاءِ وَالْمُنْكَرِ وَالْبَغْيِ
يُعِظَكُم لَعَلَّكُمْ تَذَكَّرُونَ ۝
وَأَوْفُوا بِعَهْدِ اللَّهِ إِذَا عَاهَدْتُمْ وَلَا تَنْقُضُوا الْأَيْمَانَ
بَعْدَ تَوْكِيدِهَا وَقَدْ جَعَلَهُمُ اللَّهُ عَلَيْكُمْ كَفِيلًا
إِنَّ اللَّهَ يَعْلَمُ مَا تَفْعَلُونَ ۝
وَلَا تَكُونُوا كَالَّذِي نَقَضَتْ غَزْلَهَا مِنْ بَعْدِ قُوَّةٍ
أَنْكَارًا تَتَخَفَتُونَ آيْمَانَكُمْ دَعَا بَيْنَكُمْ أَنْ تَكُونَ
أُمَّةٌ هِيَ أَرْبَىٰ مِنْ أُمَّةٍ إِنَّمَا يَبُولُكُمْ اللَّهُ بِهٖ وَيُبَيِّنُ
لَكُمْ يَوْمَ الْقِيَامَةِ مَا كُنْتُمْ فِيهِ تَخْتَلِفُونَ ۝

Ho vi, kredantoj! Estu firmaj en respekto de la justeco kiel atestantoj antaŭ Allah, ĉu kontraŭ vi mem, ĉu kontraŭ viaj gepatroj aŭ parencoj, ĉu vi estas riĉaj aŭ malriĉaj; Allah estas proksima al ambaŭ. Do ne sekvu la vanajn dezirojn, agu juste. Se vi kaŝos aŭ evitos la veron, vere Allah bone scias, kiel vi agas. (4.136)

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا كُونُوا قَوَّامِينَ بِالْقَنُطِ شُهَدَاءَ
لِلَّهِ وَلَوْ عَلَىٰ أَنْفُسِكُمْ أَوِ الْوَالِدِينَ وَالْأَقْرَبِينَ ۚ إِنَّ
يَكُنْ غَيْبًا أَوْ قَعِيرًا فَإِنَّهُ أُولَىٰ بِهِمَا نَسُوا فَلَا تَكْتُمُوا
الهُدَىٰ أَنْ تَعْدُوا ۚ وَإِنْ تَلَّوْا أَوْ لَعَضُوا فَقَانَ لِلَّهِ
كَانَ بِمَا تَعْمَلُونَ خَبِيرًا ۝

Allah ne amas la disvastigon de malbondiroj per babilado, krom se iun trafis maljusteco. Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia. Ĉu vi malkaŝas, ĉu vi kaŝas bonan agon aŭ pardonas malbonan agon, sciuj: Allah estas kompatema, ĉiopova. (4.149-150)

لَا يُحِبُّ اللَّهُ الْجَهْرَ بِالسُّوءِ مِنَ الْقَوْلِ إِلَّا
مَنْ ظَلَمَ وَكَانَ اللَّهُ سَمِيعًا عَلِيمًا
إِنْ تَبَدُّوا حَيْرًا أَوْ نَخْوَةً أَوْ تَعَفُّوا عَنْ سُوِّ
فَإِنَّ اللَّهَ كَانَ عَفُورًا قَدِيرًا

Ho vi, kredantoj! Estu persistemaj pri la afero de Allah, atestante en justeco, kaj ne instigu vin la malamikeco de iu popolo agi alie ol juste. Estu justaj; tio estas pli konforma al la respektego, kaj respektegu Allahon. Vere Allah bone scias, kion vi faras. Allah promesis al la kredantoj kaj al la bonfarantoj, ke por ili estos pardono kaj granda rekompenco. La miskredantoj kaj la rifuzantoj de Niaj signoj estos loĝantoj de l' infero. (5.9-11)

يَأْتِيهَا الَّذِينَ آمَنُوا كُونُوا قَوْمِينَ لِلَّهِ شُهَدَاءَ بِالْقِسْطِ
وَلَا يَجْرِمَنَّكُمْ شَنَا نُ قَوْمٍ عَلَىٰ آلَا تَعْدِلُوا أَعْدِلُوا
هُوَ أَقْرَبُ لِلتَّقْوَىٰ وَاتَّقُوا اللَّهَ إِنَّ اللَّهَ خَبِيرٌ بِمَا
تَعْمَلُونَ
وَعَدَ اللَّهُ الَّذِينَ آمَنُوا وَعَمِلُوا الصَّالِحَاتِ لَهُمْ
مَغْفِرَةٌ وَأَجْرٌ عَظِيمٌ
وَالَّذِينَ كَفَرُوا وَكَذَّبُوا بِآيَاتِنَا أُولَٰئِكَ أَصْحَابُ النَّجِيمِ

Ne mortigu viajn idojn pro timo de la malriĉeco. Ni provizas por ili kaj por vi. Vere, mortigi ilin estas granda peko. Ne alproksimiĝu al la adulto; tio vere estas hontindaĵo kaj malbonega vojo. Ne mortigu la vivon, kiun Allah faris neneniigenda, krom el ĝusta kaŭzo. Se iu estas mortigita maljuste, Ni donis la rajton postuli repagon, tamen li ne transpaŝu la limojn pri la mortigo, ĉar li havas ja helpon en la leĝo. Ne alproksimiĝu al la proprajoj de la orfo, krom por lia utilo, ĝis li atingos la plenaĝon, kaj plenumu la interkonsenton, ĉar pri la interkonsento vi devos respondi. Donu plenan mezuron, kiam vi mezuras, kaj pesu

وَلَا تَقْتُلُوا أَوْلَادَكُمْ خَشْيَةَ إِمْلَاقٍ نَحْنُ نَرْزُقُهُمْ
وَأِيَّاكُمْ إِنَّ قَتْلَهُمْ كَانَ خِطَاً كَبِيرًا
وَلَا تَقْرَبُوا الرِّبَا إِنَّمَا كَانَ قَابَ حَشَةٍ وَسَاءَ سَبِيلًا
وَلَا تَقْتُلُوا النَّفْسَ الَّتِي حَرَّمَ اللَّهُ إِلَّا بِالْحَقِّ وَمَنْ
قُتِلَ مَظْلُومًا فَقَدْ جَعَلْنَا لِرِيسِهِ سُلْطٰنًا فَلا يَسْرِف
فِي الْقَتْلِ إِنَّمَا كَانَ مَنصُورًا
وَلَا تَقْرَبُوا مَالَ الْيَتِيمِ إِلَّا بِالَّتِي هِيَ أَحْسَنُ حَتَّىٰ
يَبْلُغَ أَشُدَّهُ وَأَوْفُوا بِالْعَهْدِ إِنَّ الْعَهْدَ كَانَ مَسْئُولًا
وَأَوْفُوا الْكَيْلَ إِذَا كِلْتُمْ وَزِنُوا بِالْقِسْطِاسِ السِّتْقِيمِ

per ĝusta pesilo; tio estas la plej bona maniero kaj la plej konvena finfine. Ne sekvu tion, kion vi ne konas. Vere la orelo kaj la okulo kaj la koro, ili ĉiuj devos respondi. Ne vagadu malhumile sur la tero, ĉar vi ne povas defendi la teron kaj vi ne povas konkuri kun la montoj je alteco. La malbono de ĉio ĉi estas abomenindaĵo antaŭ via Sinjoro. (17.32-39)

ذَلِكَ خَيْرٌ وَأَحْسَنُ تَأْوِيلًا ○
 وَلَا تَقْفُ مَا لَيْسَ لَكَ بِهِ عِلْمٌ إِنَّ السَّمْعَ وَالْبَصَرَ
 وَالْفُؤَادَ كُلُّ أُولَئِكَ كَانَ عَنْهُ مَسْئُولًا ○
 وَلَا تَمْشِ فِي الْأَرْضِ مَرَحًا إِنَّكَ لَنْ يُخْرِقَ الْأَرْضَ
 وَلَنْ تَبْلُغَ الْجِبَالَ طُولًا ○
 كُلُّ ذَلِكَ كَانَ سَيِّئُهُ عِنْدَ رَبِّكَ مَكْرُوهًا ○

12 - PRINCIPOJ DE LA EKONOMIA SISTEMO

La ekonomia fundamenta koncepto en la Islamo estas, ke la absoluta proprieto je ĉio apartenas nur al Dio. La leĝa proprieto de la individuo, t. e. la rajto havi, uzi kaj transdoni posedaĵon, en la Islamo estas agnoskata kaj protektata, sed ĉiu proprieto estas subigita al la morala devo ke ĉiuj eroj de la socio havu justan parton de ĉiu riĉaĵo. Parto de ĉi tiu devo estas leĝe fiksita kaj subtenata de leĝaj sankcioj, sed la pli granda parto eŝtas plenumata per libervolaj klopodoj kiujn oni prenas sur sin dezirante atingi por ĉiuj koncernatoj la plej grandan spiritan kaj moralan profiton.

Kiam Ni diris al la anĝeloj: "Surgenuiĝu antaŭ Adam" ili surgenuiĝis krom Iblis. Li rifuzis. Tial Ni diris: "Ho Adam, tiu ĉi vere estas malamiko de vi kaj de via edzino. Li ne forpelu vin ambaŭ el la ĝardeno, por ke vi ne fariĝu malfeliĉaj. Por vi estis provizite, por ke vi ne estu malsata en ĝi, nek nuda. Kaj por ke vi ne soifu en ĝi kaj ne suferu la varmegon de la suno". (20.117-120)

وَإِذْ قُلْنَا لِلْمَلَائِكَةِ اسْجُدُوا لِآدَمَ فَسَجَدُوا إِلَّا إِبْلِيسَ ۖ
 أَبَى
 فَقُلْنَا يَا آدَمُ إِنَّ هَذَا عَدُوٌّ لَكَ وَلِزَوْجِكَ فَلَا
 يُخْرِجَنَّكَمَا مِنَ الْجَنَّةِ فَتَشْفُ ۖ
 إِنَّ لَكَ أَلَا تَجُوعُ فِيهَا وَلَا تَعْرَى ۖ
 وَأَنَّكَ لَا تَظْمَأُ فِيهَا وَلَا تَصْحَى ۖ

Ne formanĝu unu de la alia la havaĵojn kaj ne proponu ilin kiel subaĉeton al la aŭtoritatuloj, por formanĝi maljuste parton de la propraĵoj de aliaj. (2.189)

وَلَا تَأْكُلُوا أَمْوَالَكُم بَيْنَكُم بِالْبَاطِلِ وَتُدْلُوا بِهَا
 إِلَى الْحُكَّامِ لِنَأْكُلُوا فَرِيقًا مِّنْ أَمْوَالِ النَّاسِ بِالْإِثْمِ
 وَأَنْتُمْ تَعْلَمُونَ ۙ

Ho vi, kredantoj! Ne formanĝu reciproke viajn propraĵojn malvirte! Vi povas komerci, konsentante unu kun la alia. Kaj ne mortigu unu la alian. Vere Allah estas pardonema al vi. (4.30)

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا لَا تَأْكُلُوا أَمْوَالَكُم بَيْنَكُم
 بِالْبَاطِلِ إِلَّا أَنْ تَكُونَ تِجَارَةً عَنْ رَّاضٍ مِّنكُمْ
 وَلَا تَقْتُلُوا أَنْفُسَكُمْ إِنَّ اللَّهَ كَانَ بِكُمْ رَحِيمًا ۖ

13 - DJIHAAD-KAMPANJO/EKSTREMAJ KLOPODOJ SUR LA VOJO DE ALLAH

جِهَادٌ (Djihaad) signifas kun ekstrema streĉiĝo kontraŭbatali
ion malaprobindan, trispecan, nome 1) videblan malamikon, 2) sata-
non kaj 3) sin mem.

*La Korano instruas ke, kiam milito eksplodas, oni praktiku ĝin tiel, ke
okazu kiel eble plej malmulta damaĝo al havaĵoj kaj vivoj kaj ke la ma-
lamikaĵoj finiĝu kiel eble plej rapide.*

Permesite estas sin defendi al tiuj, kiuj estas atakitaj, ĉar ili suferis maljustecon - vere Allah havas la povon helpi ilin. Tiujn, kiuj estas maljuste forpelitaj el siaj domoj, ĉar ili diris: "Nia Sinjoro estas Allah"; se Allah ne moderigus la homojn, unu per la alia, certe estus detruitaj la monaĥejoj, la preĝejoj, la sinagogoj kaj la moskeoj, en kiuj la nomo de Allah estas ofte menciata. Allah certe helpos tiun, kiu Lin helpas. Vere Allah estas fortega, ĉiopova. (22.40-41)

أَذِنَ لِلَّذِينَ يُقْتَلُونَ بِأَنَّهُمْ ظَلَمُوا وَإِنَّ اللَّهَ عَلِيمٌ
بِظُلْمِهِمْ لَقَدِيرٌ

الَّذِينَ أُخْرِجُوا مِنْ دِيَارِهِمْ بِغَيْرِ حَقٍّ إِلَّا أَنْ
تَقُولُوا رَبَّنَا اللَّهُ وَلَوْلَا دَفْعُ اللَّهِ النَّاسَ بَعْضَهُمْ
بِبَعْضٍ لَهَدَمَتْ صَوَامِعُ وَبِيَعٌ وَصَلَوَاتٌ وَ
مَسَاجِدُ يُذَكَّرُ فِيهَا اسْمُ اللَّهِ كَثِيرًا لَيُضْمَرَ
لِللَّهِ مَنْ يَنْصُرُهُ إِنَّ اللَّهَ لَقَوِيٌّ عَزِيزٌ

Allah ne malpermesas al vi kondukti afable kaj juste kontraŭ tiuj, kiuj ne batalis kontraŭ vi pro la kredo, nek forpelis vin de viaj hejmoj. Vere Allah amas la egalanimajn. Allah nur malpermesas al vi amikiĝi kun tiuj, kiuj batalis kontraŭ vi pro la kredo kaj forpelis vin de viaj hejmoj, kaj kun tiuj, kiuj helpis forpeli vin, ĉar tiu, kiu amikiĝas kun ili, estas malpiegulo. (60.9-10)

لَا يَنْهَكُمُ اللَّهُ عَنِ الَّذِينَ لَمْ يُقَاتِلُوكُمْ فِي
الدِّينِ وَلَمْ يُخْرِجُوكُمْ مِنْ دِيَارِكُمْ أَنْ تَبَرُّوهُمْ
وَتُقْسِطُوا إِلَيْهِمْ إِنَّ اللَّهَ يُحِبُّ الْمُقْسِطِينَ
إِنَّمَا يَنْهَكُمُ اللَّهُ عَنِ الَّذِينَ قَاتَلُوكُمْ فِي الدِّينِ
وَأَخْرَجُوكُمْ مِنْ دِيَارِكُمْ وَظَهَرُوا عَلَىٰ إِخْرَاجِكُمْ
أَنْ تَوَلَّوهُمْ وَمَنْ يَتَوَلَّهُمْ فَأُولَٰئِكَ هُمُ الظَّالِمُونَ

Ho vi, kredantoj! Ĉu Mi anoncu al vi negocion, kiu savus vin de dolora puno? Kredu je Allah kaj al Lia sendito kaj batalu por la afero de Allah per viaj proprajoj kaj per viaj animoj. Tio estos pli bona por vi. Se vi nur scius! (61.11-12)

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا هَلْ أَدُلُّكُمْ عَلَىٰ تِجَارَةٍ تُحْبِبُونَ
مَنْ عَادِيَ إِلَيْهِمْ
تُؤْمِنُونَ بِاللَّهِ وَرَسُولِهِ وَتُجَاهِدُونَ فِي سَبِيلِ اللَّهِ
بِأَمْوَالِكُمْ وَأَنْفُسِكُمْ ذَلِكُمْ خَيْرٌ لَكُمْ إِنْ كُنْتُمْ
تَعْلَمُونَ

Tiuj, kiuj strebas por Nia afero, Ni gvidos sur Niajn vojojn. Vere Allah estas kun tiuj, kiuj bonfaras. (29.70)

وَالَّذِينَ جَاهَدُوا فِينَا لَنَهْدِيَنَّهُمْ سُبُلَنَا وَإِنَّ اللَّهَ
لَعَ الْمُحْسِنِينَ ۝

Tiuj, kiuj kredas, elmigras kaj batalas por la afero de Allah per siaj proprajoj kaj per sia animo, ili okupos la plej altan rangon apud Allah, kaj ili estos sukcesaj. (9.20)

الَّذِينَ آمَنُوا وَهَاجَرُوا وَجَاهَدُوا فِي سَبِيلِ اللَّهِ
بِأَمْوَالِهِمْ وَأَنْفُسِهِمْ أَكْثَرُ دَرَجَةً عِنْدَ اللَّهِ وَ
أُولَئِكَ هُمُ الْفَائِزُونَ ۝

Vere Allah aĉetis de la kredantoj iliajn animojn kaj iliajn proprajojn per la Paradizo; ili batalas por la afero de Allah, ili mortigas kaj estas mortigitaj - promeso, deviga por Li, en la Torao kaj en la Evangelio kaj en la Korano. Kiu plenumas sian promeson pli bone ol Allah? Do ĝoju pro via alianco, kiun vi konkludis kun Li. Tio estas la plej granda feliĉo. (9.111)

إِنَّ اللَّهَ اشْتَرَى مِنَ الْمُؤْمِنِينَ أَنْفُسَهُمْ وَأَمْوَالَهُمْ
بِأَنَّ لَهُمُ الْجَنَّةَ يُقَاتِلُونَ فِي سَبِيلِ اللَّهِ لِيُقَاتِلُوا
وَيُقَاتِلُوا وَوَعَدًا عَلَيْهِمْ حَقًّا فِي التَّوْرَةِ وَالْإِنْجِيلِ
وَالْقُرْآنِ وَمَنْ أَوْفَى بِعَهْدِهِ مِنَ اللَّهِ فَاسْتَبْرُوا
يَبْعَثْكُمْ فِي الْأَرْضِ بِإِعْتَمَادِهِ وَذَلِكَ هُوَ الْفَوْزُ الْعَظِيمُ ۝

Kiuj el la kredantoj estos restintaj ekster la danĝero - krom la invalidoj -, ne estos egalaj al tiuj, kiuj riskas siajn proprajojn kaj sian vivon por la afero de Allah. Plialtigis Allah je l' rango la batalantojn per havaĵoj kaj vivo super la restintoj. Al ĉiu Allah promesis bonon, kaj Allah distingas la batalantojn disde la restintoj per granda rekompenco. (4.96)

لَا يَسْتَوِي الْقَاعِدُونَ مِنَ الْمُؤْمِنِينَ غَيْرَ أُولِي الْقُوَّةِ
وَالْمُجَاهِدُونَ فِي سَبِيلِ اللَّهِ بِأَمْوَالِهِمْ وَأَنْفُسِهِمْ
فَضَّلَ اللَّهُ الْمُجَاهِدِينَ بِأَمْوَالِهِمْ وَأَنْفُسِهِمْ عَلَى
الْقَاعِدِينَ دَرَجَةً ۚ وَلَا وَعَدَ اللَّهُ الْخَوَافَةَ وَفَضَّلَ
اللَّهُ الْمُجَاهِدِينَ عَلَى الْقَاعِدِينَ أَجْرًا عَظِيمًا ۝

14 - LA ECOJ KAJ LA KARAKTERO DE KREDANTOJ

La Korano eksplikas la necesecon de la kredo je Dio kaj atentigas pri la pruvoj por Lia ekzisto. Ĝi emfazas, ke Dio ĉiam sendis Sian vorton teren per revelacio. Se Dio ĉesus per la profetoj kaj iliaj adeptoj esprimi Siajn ecojn, la firma kredo pri la ekzisto de Dio malaperus. Estas tial necese ke, dum la homaro ekzistos, dia revelacio malsupreniĝu sur iujn homojn.

Kiuj ne alvokas, krom Allahon, aliajn Diojn, kaj ne mortigas vivon, kiun Allah sanktigis, krom laŭleĝe, kaj ne adultas. - Kiu tion faras, ricevos la punon. Duobliĝos por li la puno en la tago de la reviviĝo kaj tie li restos en honto. Krom tiuj, kiuj pentas kaj kredas kaj faras bonajn farojn, ĉar iliajn malbonajn farojn Allah aliigos en bonajn - Allah estas senkulpigema, pardonema - kaj tiu, kiu pentas kaj bonfaras, tiu vere turnas sin al Allah en vera pento; kaj tiuj, kiuj ne atestas la falson, kaj, kiam ili preterpasas ion vanan, noble ili preterpasas; kaj tiuj, kiuj, kiam ili estas admonataj per la revelacioj de sia Sinjoro, ne falas teren surdaj kaj blindaj; Kaj tiuj, kiuj diras: "Nia Sinjoro, konsentu al ni per niaj edzinoj kaj idoj konsolon por la okuloj, kaj faru nin imitindaĵo por la justuloj. Ĉiuj ĉi estos rekompencitaj per la plej alta rango en la Paradizo, ĉar ili estis persistemaj, kaj ili ricevos en ĝi bonajn salutojn kaj pacon, tie por ĉiam restante; belega ĝi estas kiel ripozejo kaj restadejo. Diru: "Mia Sinjoro ne interesiĝus pri vi, se ne estus viaj preĝoj. Vi ja kulpigis je mensogo kaj la puno baldaŭ estos por vi neevitebla". (25.69-78)

وَالَّذِينَ لَا يَدْعُونَ مَعَ اللَّهِ إِلَهًا آخَرَ وَلَا يَقْتُلُونَ
النَّفْسَ الَّتِي حَرَّمَ اللَّهُ إِلَّا بِالْحَقِّ وَلَا يَزْنُونَ
وَمَنْ يَفْعَلْ ذَلِكَ يَلْقَ أَثَامًا

يُضَعَفُ لَهُ الْعَذَابُ يَوْمَ الْقِيَامَةِ وَيَخْلُدُ فِيهَا
مُهَانًا

إِلَّا مَنْ تَابَ وَآمَنَ وَعَمِلَ عَمَلًا صَالِحًا فَأُولَئِكَ
يَبَدِّلُ اللَّهُ سَيِّئَاتِهِمْ حَسَنَاتٍ وَكَانَ اللَّهُ غَفُورًا
رَحِيمًا

وَمَنْ تَابَ وَعَمِلَ صَالِحًا فَإِنَّهُ يَتُوبُ إِلَى اللَّهِ
مَتَابًا

وَالَّذِينَ لَا يَشْهَدُونَ الزُّورَ وَإِذَا مَرُّوا بِاللَّغْوِ
مَرُّوا كِرَامًا

وَالَّذِينَ إِذَا دُفِرُوا بِآيَاتِ رَبِّهِمْ لَمْ يَخْرُجُوا عَلَيْهَا
صِنًا وَعَمِيَانًا

وَالَّذِينَ يَقُولُونَ رَبَّنَا هَبْ لَنَا مِنْ أَدْوَانِنَا
ذُرِّيَّتَنَا فَرَةً أَعْيُنَ وَاجْعَلْ لَنَا لُتْفِينَ إِمَامًا

أُولَئِكَ يُجْزَوْنَ الْغُرْفَةَ بِمَا صَبَرُوا وَيُلَقَّوْنَ فِيهَا
نَجِيَّةً وَسُلَامًا

خَلِدِينَ فِيهَا حَسَنَتْ مُسْتَقَرًّا وَمُقَامًا
قُلْ مَا يَعْزُبُ عَنْكُمْ رَبِّي لَوْلَا دُعَاؤُكُمْ فَقَدْ
كَذَّبْتُمْ فَسَوْفَ يَكُونُ لِإِمَامًا

Certe prosperos la kredantoj, kiuj humiliĝas en siaj preĝoj, kiuj evitas la vanajn paroladojn, kiuj almozdonas, kiuj moderigas siajn pasiojn, krom kun siaj edzinoj aŭ kun tiuj, kiujn posedas ilia dekstra mano, ĉar tiukaze ili ne estas riproĉindaj. Tiuj, kiuj serĉas ion preter tio, estas la ekscesantoj. Tiuj, kiuj gardas sian fidon kaj siajn aliancojn, kiuj serioze atentis pri siaj preĝoj, estas la heredantoj, kiuj heredos la Paradizon; tie ili restos por ĉiam. (23.2-12)

قَدْ أَفْلَحَ الْمُؤْمِنُونَ ۝
 الَّذِينَ هُمْ فِي صَلَاتِهِمْ خَشِعُونَ ۝
 وَالَّذِينَ هُمْ عَنِ اللَّغْوِ مُعْرِضُونَ ۝
 وَالَّذِينَ هُمْ لِلزَّكَاةِ فَاعِلُونَ ۝
 وَالَّذِينَ هُمْ لِفُرُوجِهِمْ حَافِظُونَ ۝
 إِلَّا عَلَىٰ أَزْوَاجِهِمْ أَوْ مَا مَلَكَتْ أَيْمَانُهُمْ فَإِنَّهُمْ
 غَيْرُ مَلُومِينَ ۝
 فَمَنْ ابْتغىٰ وَرَاءَ ذَلِكَ فَأُولَٰئِكَ هُمُ الْعَادُونَ ۝
 وَالَّذِينَ هُمْ لِأَمْتِهِمْ وَعَهْدِهِمْ زَعُونَ ۝
 وَالَّذِينَ هُمْ عَلَىٰ صَلَوَاتِهِمْ يُحَافِظُونَ ۝
 أُولَٰئِكَ هُمُ الْوَارِثُونَ ۝
 الَّذِينَ يَرِثُونَ الْفِرْدَوْسَ هُمْ فِيهَا خَالِدُونَ ۝

15 - EGALAJ RAJTOJ POR VIROJ KAJ VIRINOJ

Antaŭ la veno de la Islamo virinoj kiel grupo ne havis leĝajn rajtojn. La Islamo estas la sola religio kiu donis perfektan sistemon de preskriboj. La Islamo komplete protektas la rajtojn de virinoj kaj donas al ili la samajn rajtojn kiujn la viroj havas en la spirita kaj religia vivosferoj. La Islamo donas al ili sendependan pozicion, donas al ili rajton je posedaĵoj kaj enkorpiĝas iliajn respondecojn kaj rajtojn en la dia leĝo.

16 - MALPERMESO DE INTEREZO KAJ RENTUMO

La vorto uzata en la Korano ligo kun rentumo estas "riba". La signifo de ĉi tiu vorto ne egalas al tiu de la vorto "rentumo", kiel ĝenerale oni supozas. "Riba" estas malpermesata, ĉar ĝi povas kaŭzi ke riĉaĵo kolektiĝas en la manojn de malgranda grupo kaj ke la praktikado de bonfaro al la proksimuloj estas limigata. En la kazo ekz. de rentumdonaj pruntoj tiu, kiu pruntedonas, fakte tiras profiton kaj gajnon el la mize-ro kaj malprospero de iu alia.

La uzuristoj ekstaros en la tago de la Juĝo, kiel ekstaras tiu, kiun Satano frapis per frenezo. Tio estas, ĉar ili diras: "Komerco similas al postuli procentegon". Tamen Allah permesis la komercon kaj malpermesis la procentegon. Do tiuj, kiuj ricevas admonon de sia Sinjoro kaj rezignas, estos pardonitaj kaj ilia ofero estos ĉe Allah. Tiuj tamen, kiuj fariĝas rekulpaj, estos loĝantoj de l'fajro kaj tie ili restos por ĉiam. Allah forigos la procentegon kaj pliiigos la bonfardan. Allah ne amas la miskredanton kaj la pekulon, kiuj estas obstinaj. Vere por la kredantoj kaj por la bonfarantoj kaj la preĝantoj kaj la almozdonoj estos la rekompenco ĉe ilia Sinjoro kaj por ili plu ne estos timo nek malgajeco. Ho vi kredantoj! Respektigu Allahon kaj forigu la restaĵon de la procentego, se vi vere estas kredantoj! Se vi tamen ne faros tion, tiam atendu la atakon de Allah kaj de Lia sendito. Se vi poste pentos, tiam restos por vi viaj propraj. Ne faru malbonon kaj vi ne ricevos malbonon. Se la ŝuldanto havas malfacilaĵojn, konsentu al li prokraston ĝis plifaciligo; se vi tamen nuligos la ŝuldon, estos ankoraŭ pli bone por vi. Se vi sciis! Timu la tagon, en kiu vi revenos al Allah: tiam ĉiu ricevos la repagon, kiun li estos meritinta, kaj por neniu estos maljusteco. (2.276-282)

الَّذِينَ يَأْكُلُونَ الرِّبَا لَا يَقُومُونَ إِلَّا كَمَا يَقُومُ الَّذِي يَخْتِطُّ الشَّيْطَانُ مِنَ الْمَسِّ ذَلِكَ بِأَنَّهُمْ قَالُوا إِنَّا تَبِيعُ مِثْلَ الرِّبَا وَأَحَلَّ اللَّهُ الْبَيْعَ وَحَرَّمَ الرِّبَا فَمَنْ جَاءَهُ مَوْعِظَةٌ مِنْ رَبِّهِ فَاتَّهَىٰ فَلَهُ مَا سَلَفَ وَأَمْرُهُ إِلَى اللَّهِ وَمَنْ عَادَ فَأُولَٰئِكَ أَصْحَابُ النَّارِ هُمْ فِيهَا خَالِدُونَ ○

يَمْحَقُ اللَّهُ الرِّبَا وَيُزِيلُ الصَّدَقَاتِ وَاللَّهُ لَا يُحِبُّ كُلَّ كَفَّارٍ أَثِيمٍ ○

إِنَّ الَّذِينَ آمَنُوا وَعَمِلُوا الصَّالِحَاتِ وَأَقَامُوا الصَّلَاةَ وَآتَوُا الزَّكَاةَ لَهُمْ أَجْرُهُمْ عِنْدَ رَبِّهِمْ وَلَا خَوْفٌ عَلَيْهِمْ وَلَا هُمْ يَحْزَنُونَ ○

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا اتَّقُوا اللَّهَ وَذَرُوا مَا بَقِيَ مِنَ الرِّبَا إِن كُنْتُمْ قَوْمِينَ ○

فَإِن لَّمْ تَفْعَلُوا فَأْذَنُوا بِحَرْبٍ مِنَ اللَّهِ وَرَسُولِهِ وَإِن تُبْتُمْ فَلَكُمْ رُءُوسُ أَمْوَالِكُمْ لَا تَظْلُمُونَ وَلَا تُظْلَمُونَ ○

وَإِن كَانَ دُونُ عُسْرَةٍ فَنَظِرَةٌ إِلَىٰ مَيْسَرَةٍ وَأَن تَصَدَّقُوا خَيْرٌ لَّكُمْ إِن كُنْتُمْ تَعْلَمُونَ ○

وَ اتَّقُوا يَوْمًا تُرْجَعُونَ فِيهِ إِلَى اللَّهِ هُ تَعْلَمُونَ كُلُّ نَفْسٍ مَّا كَسَبَتْ وَهُمْ لَا يُظْلَمُونَ ○

17 - PROFETAĴOJ

Multaj el la plej frue revelaciitaj ĉapitroj de la Korano mencias plurajn fenomenojn kiel pruvon por subteni la ĉefajn dogmojn de la Korano. Kelkaj el tiuj tekstopartoj konsistas el profetaĵoj kiuj estas realiĝintaj, kiel oni vidis en la daŭro de la jarcentoj. Kelkfoje estas parolo pri realiĝo de la laŭvorta signifo, kelkfoje de la metafora signifo aŭ de ambaŭ. Kiel ni antaŭe eksplikis, jam la nura nomo de la Libro estas granda profetaĵo, kies realiĝon oni vidis tra la jarcentoj. La unua revelacio anoncis la jarcenton de la lernado per la ofta uzo de la plumo (96:4-6).

Li liberigis ambaŭ marojn, por ke ili renkontu unu la alian. Inter ili estas baro, kiun ili ne povas transpaŝi. (55.20-21)

مَرَجَ الْبَحْرَيْنِ يَلْتَقِيَانِ ۝
بَيْنَهُمَا بَرْزَخٌ لَا يَبْغِيَانِ ۝

Ho vi kunveno de Ĝinnoj kaj homoj, se vi kapablas iri trans la limojn de la ĉieloj kaj de la tero, iru! Vi ne kapablos iri sen permeso. - Kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? - Estos sendita, kontraŭ vin ambaŭ, flamo el fajro kaj fumeĝo, kaj vi ambaŭ ne venkos. (55.34-36)

يَعْشَرَ الْجِبِّ وَالْأَيْسِ إِنْ اسْتَطَعْتُمْ أَنْ
تَنْقُذُوا مِنْ أَقْطَارِ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ فَانْقُذُوا
لَا تَنْقُذُونَ إِلَّا سُلْطِينَ ۝
فِي آيِ الْآلِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبِينَ ۝
يُرْسَلُ عَلَيْكُمَا شُوَاظٌ مِّنْ نَّارٍ وَنُحَاسٌ فَلَا
تَلْتَصِرِينَ ۝

Kiam la ĉielo krevos, kaj ĝi tiel obeos, kiel estas ĝia devo, al sia Sinjoro, kaj kiam la tero ebeniĝos, kaj elpelos tion, kio estas en ĝi, kaj tiel malpleniĝos. Kaj ĝi tiel obeos, kiel estas ĝia devo, al sia Sinjoro. (84.2-6)

إِذَا السَّمَاءُ انشَقَّتْ ۝
وَأَذِنَتْ لِرَبِّهَا وَحُقَّتْ ۝
وَإِذَا الْأَرْضُ مُدَّتْ ۝
وَأَلْقَتْ مَا فِيهَا وَتَخَلَّتْ ۝
وَأَذِنَتْ لِرَبِّهَا وَحُقَّتْ ۝

Kaj kiam la gravedaj kamelinoj estos forlasitaj. (81.5)

وَإِذَا الْبُيُوتُ تَبَخَّرْتُمْ عَلَيْهَا ۝

Kaj la animoj estos alproksimigitaj unu al la alia. (81.8)

وَإِذَا الْنُفُوسُ زُوِّجَتْ ۝

Kiam la libroj de la homaj agoj estos malvolvitaj. Kiam la ĉielo malfermiĝos. (81.11-12)

وَإِذَا الصُّحُفُ نُشِرَتْ ۗ
وَإِذَا السَّمَاءُ كُشِطَتْ ۗ

Kiam la tero skuigiĝos per sia tremego. Kaj la tero elpelos siajn ŝarĝojn. Kaj la homo diros: "Kio okazas al ĝi?" En tiu tago ĝi rakontos siajn rakontojn. Ĉar via Sinjoro revelaciis al ĝi. En tiu tago kunvenos la homoj en neordigitaj grupoj, por ke estu montritaj al ili iliaj faroj. Kiu faris bonon, eĉ tiel malgrandan kiel sableron, tiu tiam vidos ĝin. Kaj kiu faris malbonon, eĉ tiel malgrandan kiel sableron, tiu tiam vidos ĝin. (99.2-9)

إِذَا زُلْزِلَتِ الْأَرْضُ زِلْزَالَهَا ۗ
وَأُخْرِجَتِ الْأَرْضُ أَنْفَاقًا لَهَا ۗ
وَقَالَ الْإِنْسَانُ مَا لَهَا ۗ
يَوْمَئِذٍ تُحَدِّثُ أَخْبَارَهَا ۗ
بِأَنَّ رَبَّكَ أَوْحَىٰ لَهَا ۗ
يَوْمَئِذٍ يَصْدُرُ النَّاسُ أَشْتَاتًا لِّيُرَوْا أَعْمَالَهُمْ ۗ
مَنْ يَعْمَلْ مِثْقَالَ ذَرَّةٍ خَيْرًا يَرَهُ ۗ
وَمَنْ يَعْمَلْ مِثْقَالَ ذَرَّةٍ شَرًّا يَرَهُ ۗ

Ili demandas vin pri la montoj; diru: "Mia Sinjoro faros el ili polvon kaj disŝutos ilin. Kaj Li postlasos ilin kiel platan ebenajon, en kiu vi ne vidos altaĵon nek profundaĵon". (20.106-108)

وَيَسْأَلُونَكَ عَنِ الْجِبَالِ فَقُلْ يَنْسِفُهَا رَبِّي نَسْفًا ۗ
فَيَذَرُهَا قَاعًا صَفْصَفًا ۗ
لَا تَبْقَىٰ فِيهَا جَبَلًا وَلَا أَمْتًا ۗ

Kiam estos falinta la juĝo kontraŭ ili, Ni estigos el la tero iun, kiu parolos al ili, ĉar la homoj ne kredas al Niaj revelacioj. (27.83)

وَإِذَا وَقَعَ الْقَوْلُ عَلَيْهِمْ أَخْرَجْنَا لَهُمْ دَابَّةً مِّنَ الْأَرْضِ تُكَلِّمُهُمْ أَنَّ النَّاسَ كَانُوا بِآيَاتِنَا لَا يُوقِنُونَ ۝

Kiam la okulo estas blindigita. Kaj la luno mallumiĝas. Kaj unuiĝas la suno kaj la luno. (75.8-10)

فَإِذَا بَرَأَ الْبَصُرُ ۝
وَحَسَفَ الْقَمَرُ ۝
وَجُمِعَ الشَّمْسُ وَالْقَمَرُ ۝

18 - OBSERVOJ KONCERNE LA NATURON

Unu el la unikaj karakterizaĵoj de la Korano estas, ke la Libro, kvankam 1400 jarojn aĝa, atribuas nenion al la naturo kion posta esplorado montris malĝusta. Multaj tekstopartoj koncernas lastatempajn trovaĵojn, dum aliaj indikas fenomenojn ankoraŭ esplorotajn. Nur malgranda nombro da tekstopartoj estas elektita por illustri kelkajn el la konkludoj de la tre multnombraj referencoj al la naturo troviĝantaj en la Korano.

Unu el Liaj signoj estas la kreo de la ĉieloj kaj de la tero kaj de ĉiuj vivantaj estaĵoj, kiujn Li dissendis en ilin ambaŭ. Li havas la povon por kunvenigi ilin, kiam Li volas. (42.30)

وَمِنْ آيَاتِهِ خَلْقَ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ وَمَا بَيْنَهُمَا مِنْ دَابَّةٍ وَهُوَ عَلَىٰ جَمْعِهِمْ إِذَا يَشَاءُ قَدِيرٌ ۝

Estas Li Tiu, kiu estigis vin el unu persono kaj kaŭzis, ke ekzistu por vi hejmo kaj loĝejo. Vere Ni detale klarigis la signojn por la popolo komprenanta. (6.99)

وَهُوَ الَّذِي أَنْشَأَكُمْ مِنْ نَفْسٍ وَاحِدَةٍ فَمُسْتَقَرٌّ وَمُسْتَوْدَعٌ ۖ قَدْ فَصَّلْنَا الْآيَاتِ لِقَوْمٍ يَفْقَهُونَ ۝

Ho vi, homoj, respektigu vian Sinjoron, kiu kreis vin el unu estaĵo; el tiu Li kreis lian kunulinon kaj igis ambaŭ naski multajn virojn kaj virinojn; kaj respektigu Allahon, per kies nomo vi reciproke petas favorojn, kaj respektu viajn patrinojn. Vere Allah gardas vin. (4.2)

يَا أَيُّهَا النَّاسُ اتَّقُوا رَبَّكُمُ الَّذِي خَلَقَكُمْ مِنْ نَفْسٍ وَاحِدَةٍ وَخَلَقَ مِنْهَا زَوْجَهَا وَبَثَّ مِنْهُمَا رِجَالًا كَثِيرًا وَنِسَاءً ۚ وَاتَّقُوا اللَّهَ الَّذِي تَسَاءَلُونَ بِهِ وَالْأَرْحَامَ ۚ إِنَّ اللَّهَ كَانَ عَلَيْكُمْ رَقِيبًا ۝

Estas Li Tiu, kiu vin formas en la utero, kiel Li volas. Ne ekzistas alia Dio ol Li, la Ĉiopo-va, la Saĝa. (3.7)

هُوَ الَّذِي يُصَوِّرُكُمْ فِي الْأَرْحَامِ كَيْفَ يَشَاءُ ۚ لَإِلَهَ إِلَّا هُوَ الْعَزِيزُ الْحَكِيمُ ۝

Ĉu vi ne vidas, ke Allah kreis la ĉielojn kaj la teron per la vero? Se Li volas, Li povas ne-niigi vin kaj estigi novan kreon. (14.20)

أَلَمْ تَرَ أَنَّ اللَّهَ خَلَقَ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضَ بِالْحَقِّ ۗ إِنَّ يَشَاءُ يَذْهَبَكُمْ وَيَأْتِ بِخَلْقٍ جَدِيدٍ ۝

Vi vidas la montojn - vi opinias ilin firmaj, tamen ili moviĝas kiel la movado de la nuboj: tio estas verko de Allah, kiu kreis ĉion. Vere Li bone scias, kion vi faras. (27.89)

وَتَرَى الْجِبَالَ تَحْسَبُهَا جَامِدَةً وَهِيَ تَمُرُّ مَرَّ السَّحَابِ صُنِعَ اللَّهُ الَّذِي لَيْسَ أَتَقَنَّ كُلَّ شَيْءٍ إِنَّهُ خَبِيرٌ بِمَا تَعْمَلُونَ ○

Ho vi homoj, se vi estas en dubo pri la reviviĝo, pensu, ke Ni kreis vin el polvo, poste el spermoguto, poste el buleto da sango, poste el peco da karno, parte formita kaj parte neformita, por klarigi tion al vi. Kaj Ni lasas resti en la utero, kion Ni volas, ĝis fiksita tempo; poste Ni estigas vin kiel infanojn, poste Ni kreskigas vin ĝis la matura aĝo. Iuj el vi estas forprenitaj, aliaj atingas la maljunecon, tiel ke ili nenion plu scias, kion ili kutimis scii. Kaj vi vidas la teron sen viva, tamen, kiam Ni sendas sur ĝin la akvon, ĝi moviĝas kaj ŝvelas kaj kreskigas ĉion belegan. (22.6)

يَا أَيُّهَا النَّاسُ إِن كُنْتُمْ فِي رَيْبٍ مِّنَ الْبَعْثِ فَإِنَّا خَلَقْنَاكُمْ مِّن تَرَابٍ ثُمَّ مِنْ نُّطْفَةٍ ثُمَّ مِنْ عَلَقَةٍ ثُمَّ مِنْ مُضْغَةٍ مُّخَلَّقَةٍ وَغَيْرِ مُخَلَّقَةٍ لِّنُبَيِّنَ لَكُمْ وَنُقِذَ فِي الْأَرْحَامِ مَا نَشَاءُ إِلَىٰ آجَلٍ مُّضَيَّعٍ ثُمَّ نَخْرِجُكُمْ طِفْلًا ثُمَّ لِيَبْلُغُوا أَشُدَّكُمْ وَمِنْكُمْ مَّن يَتُوفَىٰ وَمِنْكُمْ مَّن يُرَدُّ إِلَىٰ أَرْذَلِ الْعُمُرِ لِكَيْلَا يَعْلَمَ مِن بَعْدِ عِلْمٍ شَيْئًا وَتَرَى الْأَرْضَ هَامِدَةً فَإِذَا أَنزَلْنَا عَلَيْهَا الْمَاءَ اهْتَزَّتْ وَرَبَتْ وَأَبْتَتَتْ مِن كُلِّ زَوْجٍ بَهِيجٍ ○

Li kreis ĉevalojn kaj mulojn kaj azenojn, por ke vi rajdu sur ili, kaj kiel ornamajon, kaj Li kreos, kion vi ankoraŭ ne scias. (16.9)

وَالْحَيْلَ وَالْبِغَالَ وَالْحَبِيرَ لِتَرْكَبُوهَا وَزِينَةً وَيَخْلُقُ مَا لَا تَعْلَمُونَ ○

Estu benata Tiu, en kies mano estas la suvereneco. Li havas povon super ĉiuj aferoj. Tiu, kiu kreis la morton kaj la vivon por elprovi vin, por eksciigi kiu el vi estas la plej bona ĉe la faroj. Li estas la Ĉiopova, la Senkulpigema. Tiu, kiu kreis sep ĉielojn en akordo. Vi ne povas vidi en la kreo de la Donema iun ajn mankon. Turnu do ĉien ajn vian rigardon: ĉu vi vidas iun ajn mankon? (67.2-4)

تَبَارَكَ الَّذِي بِيَدِهِ الْمُلْكُ وَهُوَ عَلَى كُلِّ شَيْءٍ
قَدِيرٌ ۝

الَّذِي خَلَقَ الْمَوْتَ وَالْحَيَاةَ لِيَبْلُوَكُمْ أَيُّكُمْ
أَحْسَنُ عَمَلًا وَهُوَ الْعَزِيزُ الْغَفُورُ ۝

الَّذِي خَلَقَ سَبْعَ سَمَاوَاتٍ طِبَاقًا مَا تَرَى فِي
خَلْقِ الرَّحْمَنِ مِنْ تَفْوُتٍ فَأَرْجِعِ الْبَصَرَ هَلْ
تَرَى مِنْ فُطُورٍ ۝

19 - KELKAJ PREĜOJ LAŬ LA INSTRUO EN LA SANKTA KORANO

Preĝo estas dinamisma ligo inter Dio kaj piulo. Komence la graco de Dio altiras iun al Dio. Ĉi tiu persono respondas al tio per danko kaj sincereco kaj Dio pliproksimiĝas al li. En la preĝo tiu ĉi ligo ricevas propran signifon kaj rezultiĝas propran efikon. Tiuj, kiuj konas spiritajn spertojn kaj sukcesojn, scias - per plurfoja sperto - ke perfekte pia homo per preĝo ricevas kreaĵon forton.

Kiam Miaj servantoj demandas vin pri Mi: vere Mi estas proksima, Mi ĉiam respondas al la preĝo de preĝanto, kiam li petas, do aŭskultu Min kaj kredu je Mi, por ke vi sekvu la ĝustan vojon. (2.187)

وَإِذَا سَأَلَكَ عِبَادِي عَنِّي فَإِنِّي قَرِيبٌ أُجِيبُ دَعْوَةَ الدَّاعِ إِذَا دَعَانِ فَلْيَسْتَجِيبُوا لِي وَلْيُؤْمِنُوا بِلَعَلَّهُمْ يَرْشُدُونَ

Aliaj inter ili diras: "Nia Sinjoro, donu al ni bonajn aĵojn en ĉi tiu vivo kaj en la vivo venonta kaj ŝirmu nin kontraŭ la puno de l'fajro!" Por ili estos ilia parto de proprajoj laŭ ilia merito. Allah estas rapida je l'juĝo. (2.202-203)

وَمِنْهُمْ مَن يَقُولُ رَبَّنَا آتِنَا فِي الدُّنْيَا حَسَنَةً وَفِي الْآخِرَةِ حَسَنَةً وَقِنَا عَذَابَ النَّارِ
أُولَئِكَ لَهُمْ نَصِيبٌ مِّمَّا كَسَبُوا وَاللَّهُ سَرِيعُ الْحِسَابِ

Allah ne ŝarĝos iun ajn animon super ĝia kapablo, kaj por ĉiu kaj kontraŭ ĉiu estos nur tio, kion li estos meritinta. "Nia Sinjoro, ne punu nin, se ni forgesis aŭ eraris kaj ne postulu pravigon de ni, nia Sinjoro, kiel Vi postulis de tiuj, kiuj venis antaŭ ni. Nia Sinjoro, ne metu sur nin ion, kion ni ne kapablas elteni; pardonu kaj senkulpigu nin kaj havu kompaton al ni! Vi estas nia Majstro, do helpu nin kontraŭ la popolo miskredanta". (2.287)

لَا يَكْفِيكَ اللَّهُ نَفْسًا إِلَّا وَسَعَهَا لَهَا مَا كَسَبَتْ وَعَلَيْهَا مَا كَسَبَتْ رَبَّنَا لَا تَأْتِنَا إِلَّا أَنْ نَحْمِلَهُمْ كَمَا حَمَلْتَهُ عَلَى الَّذِينَ مِنْ قَبْلِنَا رَبَّنَا وَلَا تُحِيزْنَا مَا لَنَا قَدْرًا وَلَا نَبْهِنَا مِنْ غَنَائِنَا رَبَّنَا وَيَا أَرْحَمَ الرَّاحِمِينَ أَنْتَ مَوْلَانَا فَانصُرْنَا عَلَى الْقَوْمِ الْكَافِرِينَ

Vere en la kreo de la ĉieloj kaj de la tero kaj en la alternado de la nokto kaj de la tago estas signoj por la prudentuloj, kiuj memo-

إِنَّ فِي خَلْقِ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ وَاخْتِلَافِ اللَّيْلِ وَالنَّهَارِ لَآيَاتٍ لِّأُولِي الْأَلْبَابِ

ras Allahon starante aŭ kuŝante surflanke, kaj pripensas pri la kreo de la ĉieloj kaj de la tero: "Sinjoro, ne vane Vi kreis tion, Vi estas sankta, savu nin de la puno de l'fajro!". Nia Sinjoro, tiun, kiun Vi puŝas en la fajron, vere Vi hontigis. La pekuloj ne havos helpanton. Nia Sinjoro, ni vere aŭdis iun vokanton al la kredo: "Kredu je via Sinjoro" kaj ni kredis. Nia Sinjoro, pardonu al ni niajn pekojn kaj forigu niajn erarojn kaj aligu nin - kiam ni mortos - al la justuloj. Nia Sinjoro, donu al ni, kion vi promesis per viaj senditoj, kaj ne hontigu nin en la tago de la reviviĝo. Vere, Vi ne rompas la promeson. Respondis al ili ilia Sinjoro: "Vere Mi ne permesos, ke vaniĝu la faro de la farantoj, el vi, aŭ viro aŭ virino. Ĉiu devenas de la alia. Kaj rilate al tiuj, kiuj elmigris kaj kiuj estis forpelitaj de siaj domoj kaj estis persekutitaj pro Mia afero kaj batalis kaj estis mortigitaj, Mi vere forprenos de ili iliajn erarojn kaj kondukos ilin en la ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj: tio estos la rekompenco de Allah. Ĉe Allah estos belega rekompenco. (3.191-196)

الَّذِينَ يَدْعُونَ اللَّهَ قِيَامًا وَقُعُودًا وَعَلَىٰ جُنُوبِهِمْ
وَيَتَفَكَّرُونَ فِي خَلْقِ السَّمَوَاتِ وَالْأَرْضِ رَبَّنَا مَا
خَلَقْتَ هَذَا بَاطِلًا سُبْحَانَكَ فَقِنَا عَذَابَ النَّارِ
رَبَّنَا إِنَّكَ مَن تَدْخِلُ النَّارَ فَقَدْ أَخْرَجْتَهُهَا وَمَا
لِلظَّالِمِينَ مِن أَنْصَارٍ
رَبَّنَا إِنَّا أَسْعَفْنَا مَادِيًا نِّيَادِي لِلإِيمَانِ أَنْ آمِنُوا
بِرَبِّكُمْ فَأَمَّا ۙ رَبَّنَا فَأَغْفِرْ لَنَا ذُنُوبَنَا وَكَفِّرْ عَنَّا
سَيِّئَاتِنَا وَتَوَقَّنَا مَعَ الْآبِرَارِ
رَبَّنَا وَإِنَّا مَا وَعَدْتَنَا عَلَىٰ رُسُلِكَ وَلَا تُخْزِنَا يَوْمَ
الْقِيَامَةِ إِنَّكَ لَا تُخْلِفُ الْوَعْدَ
فَأَسْتَجِبْ لَهُمْ رَبُّهُمْ أَنِّي لَا أَضِيعُ عَمَلَ عَامِلٍ
مِّنْكُمْ مَّن ذَكَرُوا أَنِّي بَعْضُكُمْ مِّن بَعْضٍ فَالَّذِينَ
هَاجَرُوا وَأُخْرِجُوا مِن دِيَارِهِمْ وَأُذُوا فِي سَبِيلِي
وَقُتِلُوا أَوْ قُتِلُوا لَأَكْفِرَنَّ عَنْهُمْ سَيِّئَاتِهِمْ وَأَدْخِلَنَّهُمْ
جَنَّاتٍ تَجْرِي مِن تَحْتِهَا الْأَنْهَارُ ثَوَابًا مِّن عِنْدِ
اللَّهِ وَاللَّهُ عِنْدَهُ حَسَنُ الثَّوَابِ

**20 - KELKAJ MALLONGAJ ĈAPITROJ DE
LA SANKTA KORANO FACILE
PARKERIGEBLAJ**

Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema. Per la posttagmezo! Vere la homoj iras al sia perejo, krom la kredantaj kaj bonfarantaj, kaj la reciproke admonantaj pri la vero, kaj la reciproke rekomendantaj la paciencon. (103.1-4)

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
وَالْعَصْرِ

إِنَّ الْإِنْسَانَ لِرَبِّهِ لَكَنُفٍ
إِلَّا الَّذِينَ آمَنُوا وَعَمِلُوا الصَّالِحَاتِ وَتَوَاصَوْا
بِالْحَقِّ هُ وَتَوَاصَوْا بِالصَّبْرِ

Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema. Diru: "Ho vi miskredantoj! Mi ne adoras, kion vi adoras. Kaj vi ne adoras, kion mi adoras. Mi ne volas adori, kion vi adoras. Kaj vi ne volas adori, kion mi adoras. Vi havas vian kredon, kaj mi havas mian kredon!". (109.1-7)

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
قُلْ يَا أَيُّهَا الْكَافِرُونَ
لَا أَعْبُدُ مَا تَعْبُدُونَ
وَلَا أَنْتُمْ عِبُدُونَ مَا أَعْبُدُونَ
وَلَا أَنَا عَابِدٌ مَّا عَبَدْتُمْ
وَلَا أَنْتُمْ عِبُدُونَ مَا أَعْبُدُونَ
لَكُمْ دِينُكُمْ وَلِيَ دِينٌ

Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema. Kiam venas la helpo de Allah kaj la venko, kaj vi vidas la homojn eniri amase en la religion de Allah, tiam vi laŭdegu la gloron de via Sinjoro kaj petu Lian pardonon; Li certe turnos sin kompateme al vi. (110.1-4)

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
إِذَا جَاءَ نَصْرُ اللَّهِ وَالْفَتْحُ
وَرَأَيْتَ النَّاسَ يَدْخُلُونَ فِي دِينِ اللَّهِ أَفْوَاجًا
فَسَبِّحْ بِحَمْدِ رَبِّكَ وَاسْتَغْفِرْهُ إِنَّهُ كَانَ تَوَّابًا

Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema. Diru: "Li estas Allah, la Unueco. Allah la Sendependa, de kiu ĉio dependas. Li ne naskis kaj ne estis naskita. Kaj neniu estas simila al Li". (112.1-5)

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
 قُلْ هُوَ اللَّهُ أَحَدٌ
 اللَّهُ الصَّمَدُ
 لَمْ يَلِدْهُ وَلَمْ يُولَدْ
 وَلَمْ يَكُنْ لَهُ كُفُوًا أَحَدٌ

Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema. Diru: "Mi serĉas rifuĝon ĉe la Sinjoro de la matenruĝo kontraŭ la malbono, kiu ekzistas en la kreaĵo, kaj kontraŭ la malbono de la malluma punkto, kiu disvastiĝas, kaj kontraŭ la malbono de tiuj, kiuj blovas sur la nodojn (por disigi ilin),* kaj kontraŭ la malbono de la enviato, kiu envias". (113.1-6)

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
 قُلْ أَعُوذُ بِرَبِّ الْفَلَقِ
 مِنْ شَرِّ مَا خَلَقَ
 وَمِنْ شَرِّ غَاسِقٍ إِذَا وَقَبَ
 وَمِنْ شَرِّ النَّفَّاثَاتِ فِي الْعُقَدِ
 وَمِنْ شَرِّ حَاسِدٍ إِذَا حَسَدَ

Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema. Diru: "Mi serĉas rifuĝon ĉe la Sinjoro de la homoj, la Reĝo de la homoj, la Dio de la homoj, kontraŭ la malbono de la flustranto rampanta. de tiu, kiu flustras en la korojn de la homoj, de la Ĝinnoj kaj de la homoj. (114.1-7)

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ
 قُلْ أَعُوذُ بِرَبِّ النَّاسِ
 مَلِكِ النَّاسِ
 إِلَهِ النَّاسِ
 مِنْ شَرِّ الْوَسْوَاسِ الْخَنَّاسِ
 الَّذِي يُوَسْوِسُ فِي صُدُورِ النَّاسِ
 مِنَ الْإِحْتِثَاءِ وَالنَّاسِ

* t.e.: por estiĝi skismoj